

Ferenc Molnár

LUDO EN LA KASTELO



Hungaria Esperanto-Asocio

e-libro HEA

Ferenc Molnár

Ludo en la kastelo

Anekdoto en tri aktoj

**Hungaria Esperanto-Asocio
Budapeŝto 2025**

Originala titolo: Játék a kastélyban
Eldonis: Athaeneum Irodalmi és Nyomdai R.-T. Budapest, 1926

Tradukis el la hungara originalo: Jozefo Horvath

Eldonis: Hungaria Esperanto-Asocio

Titolpaĝo: Jozefo Horvath

ISBN 978-963-571-520-6

@Horváth József 2025

e-libro HEA

Personoj

Turai

Gál

Ádám

Anjo

Almády

Sekretario

Lakeo

Okazas en kastelo ie ĉe la itala marbordo.

UNUA AKTO

Ornamriĉa gastoĉambro en tre bela ĉemara kastelo. Pordo dekstre kaj maldekstre. Meze de la scenejo garnituro: kanapo, tablo, du brakseĝoj. Fone granda fenestro. Stelplena nokto. Mallumo sur la scenejo. Kiam la kurteno leviĝas, el la flanko de la maldekstra enireja pordo aŭdiĝas laŭta vira konversacio. La enireja pordo malfermiĝas kaj enpaŝas tri smokingaj sinjoroj en la ĉambron. Unu tuj ŝaltas la lumon. Senvorte ili iras mezen, stariĝas ĉirkaŭ la tablo. Ĉiuj tri ekfumas. Poste samtempe ili sidiĝas: Gál en la maldekstra, Turai en la dekstra brakseĝo. Ádám meze sur la kanapo. Tre longa, preskaŭ ĝena silento. Fumonuboj. Oportunema lokiĝo. Silento, poste:

Gál: Pri kio vi enpensiĝis tiel profunde?

Turai: Mi pensas pri tio, kiel malfacile estas komenci teatraĵon. Prezenti tuj ĉe la komenco la rolulojn.

Ádám: Tio ja povas esti malfacila.

Turai: Ho, kiom malfacila! La prezentado komenciĝas. La spektantaro silentiĝas. La aktoroj paŝas sur la scenejon kaj komenciĝas la ĝenoj. Daŭras ĝis eterneco, kelkfoje eĉ kvaronhoron, ĝis la publiko ekscias, kiu estas kiu kaj kion volas.

Gál: Via cerbo estas kurioza. Eĉ por momento vi ne povas forgesi vian arton.

Turai: Ja ankaŭ ne eblas.

Gál: Ne pasas duonhoron, sen ke vi ne parolus pri teatro, aktoroj, teatraĵoj. Ekzistas ankaŭ ceteraĵoj en la mondo.

Turai: Ekzistas nenio cetera. Mi estas dramaturgo, kaj tio estas peza malbeno. Jam Alphonse Daudet skribis en siaj memoraĵoj, ke kiam lia patro mortis, li pensis pri tio, kiel impresa sceno tio estus sur la scenejo.

Gál: Bone, tamen oni tamen ne povas esti tiom sklavo de sia arto.

Turai: Se ne ĝia sinjoro, do ĝia sklavo. Meza vojo ne ekzistas. Kredu min, ne estas ŝerco komenci bone teatraĵon! Tio estas unu el la plej malfacilaj scenceĥnikaj problemoj. Rapide prezenti la figurojn. Ni prenu ekzemple nian triopon. Tri smokingaj sinjoroj. Se ni paŝus ne en ĉi

tiun ĉambron de jena grandsinjora kastelo, sed sur scenejon, ĝuste kiam la teatraĵo komenciĝas. Ni bezonus kunskrapo amason da sen-interesaĵoj, ĝis evidentiĝus, kiuj ni estas. Ĉu ne estus multe pli simple komenci la aferon tiel, ke ni elvenus kaj prezentus nin. (*Stariĝas.*) Bonan vesperon. Ni tri estas gastoj en la kastelo, nun ni venas el la manĝejo, bongustege ni vespermanĝis, trinkis du botelojn da ĉampano. Mia nomo estas Aleksandro Turai, mi estas same dramaturgo, de tridek jaroj mi verkas teatrajn pecojn, senescepte en la societo de la ĉeestantaj sinjoroj. Ni du estas fama dramaturga firmao. Sur la afiŝo de ĉiu bona komedio aŭ operetlibreto staras jeno: verkita de Gál kaj Turai. Kompreneble, mi ankaŭ vivas el tio. Punkto. Nun sekvas vi.

Gál (*stariĝas*): Mia nomo estas Gál, mi estas same dramaturgo, de tridek jaroj mi verkas teatrajn pecojn, senescepte en la societo de la ĉeestantaj sinjoroj. Ni du estas fama dramaturga firmao. Sur la afiŝo de ĉiu bona komedio aŭ operetlibreto staras jeno: verkita de Gál kaj Turai. Kompreneble, mi same el tio vivas.

Gál kaj Turai (*samtempe*): Kaj ĉi tiu juna sinjoro...

Ádám (*stariĝas*): Kaj ĉi tiu juna sinjoro estas, kun via permeso, Alberto Ádám, dudek-kvinjara, komponisto. Mi verkis la muzikon por la plej nova opereto de ĉi tiuj du afablaj sinjoroj. Ĝi estas mia unua sceneja laboro. Ĉi tiuj du pli aĝaj anĝeloj malkovris min, kaj nun mi volus famiĝi kun ilia helpo. Ili igis inviti min ankaŭ en ĉi tiun kastelon. Ili kudrigis miajn frakon kaj smokingon. Portempe ja mi estas ankoraŭ malriĉa kaj nekonata. Cetere: frue mi orfigis, kaj mia avino edukis min. Ŝi jam mortis. Nun mi estas sola en la mondo: havas nek nomon, nek monon.

Turai: Sed vi estas juna.

Gál: Kaj talenta.

Ádám: Kaj enamiĝinta al la primadono.

Turai: Tion vi ne bezonis diri, tion la publiko jam estus de si mem diveninta.

Ĉiuj tri sidiĝas.

Turai: Ĉu ne estus plej simple tiel komenci pecon?

Gál: Nu ja, se tio eblus, facile oni verkus teatraĵojn.

Turai: Tio ne estas tiel malfacila, kredu min! Vidu, la tuta afero...

Gál: Bone, bone, sed ne rekomencu paroli pri teatro. Mi satiĝis ĝisgorgĝe. Morgaŭ ni parolos, se vi ordonos.

Turai: Vi pravas. Jen finfine kelkaj feliĉaj, senzorgaj horoj. Bela aŭtoveturado! Italio! Kaj adiaŭ skribotablo, skribmaŝino, adiaŭ misodoraj kulisoj, falsaj aktoroj kaj veraj direktoroj! Dum la tuta jaro mi ĝojas pri ĉi kelkaj semajnoj, kiujn mi kutimas pasiĝi ĉi tie. Bonega loko, perfekta dommastro, vera amiko kaj vera sinjoro, kiu lasas liberaj siajn gastojn! Krome mi ŝatas ĉi tiun delikatan, riĉan mondon, kiu tiom nemankeblas eĉ en plej malbona opereta teksto. Kaj ni ne forgesu, kio estas plej grava – la laboro estas preta! Pretiĝis la nova opereto! Kaj someras, belas la nokto, antaŭ ni bluas la maro kaj bonege gustis la vespermanĝo... (*Jetas rigardis al sia horloĝo.*) ...kaj ankoraŭ ne tre malfrue. La dua kaj dek minutoj. Kaj bela tago. Indas memori ĝin.

Gál: Vendredo.

Turai: Ĝuste.

Gál: Ho, se ne estus tiel!

Turai: Pa! Komenciĝas la superstiĉa memturmentado.

Gál: Vi bone scias, oni ne alvenu vendrede.

Ádám (*feliĉe revas sur la kanapo*): Ba, sinjoroj... estas tutegale, ĉu vendredo, sabato, dimanĉo, printempo, somero, aŭtuno, vintro. Ĉio estas bela! (*Fermas la okulojn.*)

Turai: Por mi mardo estas malbona tago. (*al Gál*) Ekzemple vi naskiĝis marde.

Gál: Vidu, ĝis nun mi havis la sekvajn misŝancojn pro vendredo. Tagmeze ĉe San Martino: torenta pluvo kaj pneŭdifekto, pro tio malfruo de unu horo. Posttagmeze ĉe Fiero surveturo de hundo, halto, popol-ariĝo, kverelo kaj pago. Pro tio alveno anstataŭ la oka vespere je la deka horo. Vendredo. Kiu ne estas hejme? La bonega dommastro kaj la tuta societo, inter ili tiu, pro kiu ni propre alveturis. Ili ekskursas. Vendredo: Kie estas la primadono, la juna kaj la plej talenta, la plej bela, la plej dolĉa, la plej grava gasto de ĉi tiu kastelo? Kun ili en la ekskurso. Ĉu ŝi revenos ĝis vespero? Ne, Kiam ŝi revenos? Neniu scias.

Vendredo!

Turai: Ŝi iam tamen revenos.

Gál: Se nun ŝi venos, jam sabate ŝi venos.

Ádám (*revante*): Ho! Atendi ĝis morgaŭ... por vidi ŝin... Unu tuta, longa nokto...

Gál: Vendredo.

Turai: Do bone. Nun sekvos mi. Vendredo: brilega tagmanĝo en San Martino, nesuperebla espresso. Prave, dum ni tagmanĝis, pluvegis. Sed ĉe la kafo neatendita sunlumo, do senpolva landvojo kaj aroma aero. Surveturo de hundo, popol-ariĝo, prave. Sed du bonŝancoj: la hundo restis viva, kaj oni ne trabatis nin. Alveno en la kastelo malfrue, prave, sed ree bonŝanco: neniu estas hejme, la lacaj vojaĝantoj ne devas fari ĝenajn konversaciojn, kaj tamen ricevas supere fajnajn paprikajn kokinfrikasojn, fore de la patrujo, sur la bordo de la itala maro. Kaj la ĉefa bonŝanco, la plej granda: ĉi tiu ĉambro, ĉi tiu ĉambro apud tiu de la anĝelo, kun ĉi tiu interĉambra pordo... (*al Ádám, forte emfazante*) kun ĉi tiu interĉambra pordo! Ĝuste ĉi tiu ĉambro estas malplena, kaj danke al mia malnova amikeco kun la ĉefĉambristo, ĝi estas asignita al ni. Tio estas ja bonŝanco!

Gál (*al Ádám*): Lia bonŝanco.

Turai: Lia bonŝanco estas ankaŭ nia bonŝanco. Se ili du estas feliĉaj, al li enkapigo pli belaj melodioj, kaj la anĝelo kantos pli bele. Kaj la sukceso estos komuna. De ni ĉiuj. Ĉu ŝi ne estas hejme? Des pli bela estos la surprizo: la anĝelo alvenos dum la nokto nenion konjektante el la ekskurso, eniros sian ĉambreton, kuŝiĝos en ŝia liteto...

Gál: Kial vi diminue, vi ravito? Ŝi havas bele grandan ĉambron kaj grandegan liton. Mi konas tiun lokon.

Turai: Estas indiferece. Gravas, ke ŝi venos hejmen, kaj eĉ ne konjektas, ke ni troviĝas ĉi tie kaj portis al ŝi la pretan opereton. Sinjoroj! La pretan opereton, kaj ni pretas kanti el ĉi tiu opereto tiun ankoraŭ ne mondfaman, sed certe mondkonkerontan grandan valson, la ĉefvalson, la ĉieflugan valson, kiun ĉi tiu senkulpa infano, kun la tuta entuziasmo de sia juna koro...

Gál (*interrompas lin*): Sufiĉe! Li povus tromemfidiĝi. (*Rigardas sian*

horloĝon.) Tuj la dua kaj tridek. Sinjoroj! Mi havas proponon. Ni enlit-iĝu. Mi estas mortlaca. Ni kantu morgaŭ. Se ĝis nun ŝi ne venis, ĝis matene ŝi certe restos. Mi konas ĉi tiun domon. Ni ellitiĝis je la kvina matene, kvarcent kilometroj zumas en mia kapo. Kaj la senkulpa junulo jam dormas.

Ādām (*alarmita el sia duondormo*): Mi ne dormas. Mi aŭdas ĉiun vorton.

Gál: Kion mi do diris?

Ādām: Je la kvina matene, kvarcent kilometroj, io kun via kapo...

Gál: Nu, vidu!

Turai: Ankaŭ mi ne kontraŭas, se ni prokrastas la surprizon ĝis matene. Per la valso ni vekos ŝin.

Ādām: Nur ŝi ne eksciu pli frue, ke ni alvenis.

Turai: Vi ĉiufoje fidu al mi! Severe mi instrukciis al la maljuna pordisto, ke ĝis morgaŭ matene li diru al neniuj en la mondo, ke ni alvenis. (*al Ādām*) La pordisto estas ĉi tie preskaŭ tiel granda sinjoro kiel la dommastro.

Ādām (*stariĝas*): Do mi iras baniĝi.

Turai: Tre bela, logika interligo. Kion komunan havas la pordisto al la baniĝo?

Ādām: Mi malamas logikon.

Gál: Ĉu nun vi volas baniĝi?

Ādām: Jes.

Gál: Ĉu en la maro?

Ādām: Ne, en bankuvo. Sidi nur, dormema, laca, esperplena, feliĉa en la tepida akvo, kun fermitaj okuloj... bonege! Mi jam ankaŭ iras.

Turai: Iru, filo! Faru, kio agrablas al vi! La artiston, kiam li kreas, oni devas flegi. (*al Gál*) Ĉu vi konis lian avinon?

Gál: Ne.

Turai: Ŝi estis tiel eta. (*Montras tion.*) La plej malalta maljunulino, kiun mi iam vidis en mia vivo. Ŝi estas la kaŭzo, ke ĉi tiu knabo restis tiel ŝlemila. Neniam mi forgesos, kiam unuafoje ŝi venigis lin al mi, por prezenti lin. Ŝi laŭvorte alkriis min: "Ĉi tiu infano estas geniulo, tuj aŭskultu liajn komponaĵojn!"

Ádám: Kiom mi tiam timtremis!

Turai: Se ne paroli pri mi! Jes, jes. (*enpensiĝe*) Ŝia patrino... estis bela, silentema virino.

Ádám (*emociite*): Mi preskaŭ tute ne memoras ŝin.

Turai: Ho, mi preskaŭ vidas ŝin antaŭ mi! Jes ja, certe, tiel juna artisto devas kelkfoje lukti tre multe, ĝis li alsupras. Sed kun vi tio ne okazos. Pri vi zorgas du saĝaj homoj. Nu do, iru, filo, banu vin, dormu, amu, ĝoju pri via fianĉino, ĝoju pri ĉi tiu bela vivo en la kastelo!

Gál: Vi edukis lin revema. Li bezonas ekkoni ankaŭ la maldolĉaĵojn de la vivo.

Turai: Ĉu tio estas por vi urĝa?

Gál: Ĉu por mi? Ne.

Turai: Do por li eĉ pli malmulte. Iru, filo, ripozu sate, kaj morgaŭ estu freŝa kaj bonhumora!

Ádám (*ĉirkaŭrigardas*): Do ĉi tiu estas mia ĉambro?

Turai: Jes ja, anĝeleta. (*signifoplene*) Kaj malantaŭ ĉi tiu muro loĝas ŝi, la feliĉa fianĉino. Propre klasika situacio. La sama kiel tiu de Piramo kaj Tisbe en la *Somermeznokta sonĝo*. Ili reciproke enamigis... kaj muro dividas ilin. Kiel diras Piramo? "Kaj vi, ho muro, kara, aminda, dolĉa mur', staranta inter mia kaj ŝia patra grundo."

Gál: Bone, bone. Ree teatro, ree teatro!

Ádám: Kaj vi du?

Gál: Vi povas esti trankvila. Ni loĝas en la kontraŭa alo. Nia ĉambro situas tie. (*Montras ĝin.*)

Ádám: Ĉu vi loĝas ambaŭ en unu ĉambro?

Turai: Ĉiufoje. Veraj kunaŭtoroj eĉ por momento ne forlasas unu la alian. Eĉ unu ideeto ne devas perdiĝi. Krome, en sonĝo mi kutime parolas. Onidire tiam mi rakontas la plej bonajn ŝercojn, kaj li maldorme dormas, kaj ĉiufoje notas ĉion.

Ádám (*ĉe la enireja pordo*): Patroj miaj! Mi volas fari deklaron. Mi amas vin, la vivo estas bela kaj mi estas feliĉa! (*Klinas sin kaj eliras.*)

Turai (*post paŭzo*): Post ĉi tiu decida deklaro mi inklinas trinki glason da bona konjako.

Gál: Du.

Turai (*sonorigas*): Mia animo plezuras vidi ĉi tiun infanon tiel feliĉa. Mi neniam havis infanon, kaj post kvindeko da jaroj oni tiom plenas de patra amo, ke oni preskaŭ deziras havi unu. Ĉi tiu kompatindulo ja bezonus iom da patra zorgado. (*Ree sonorigas.*) Mi esperas, ke la personaro ankoraŭ ne iris dormi. (*enpensighe*) Nu jes... lia patrino estis kara, bela, silentema virino. (*Elrigardas tra la fenestro.*) Sur la bordo antaŭ la hotelo oni ankoraŭ dancas. La dancantaj paroj estas prilumataj per reflektoroj... Tio estus bona sceneja bildo en opereto, en la finalo... vi scias, kun ĉi tiu bela, blua stelplena ĉielo fone... la maro kun multaj koloraj lumpunktetoj... belega kuliso! (*Forturnas sin de la fenestro.*) Mi devas kredi, ke la knabo pravas: la vivo estas bela! (*Sidiĝas. Estas feliĉa.*)

Gál: He! Antaŭe mi ne volis diri, sed propre ankaŭ tio ankoraŭ apartenas al vendredo.

Turai: Kio?

Gál: Io ne agrabla. Mi havas novaĵon por vi. Ne agrablan.

Turai: Vi estas kurioza besto. Apenaŭ oni sentas sin bone dum kvin minutoj, tuj vi havas ion kontraŭe.

Gál: Atendu, baldaŭ ankaŭ vi havos.

Turai: Nu, ek, oldulo! Misigu mian humoron! Kio okazis?

Gál: Mi vidis nomon malsupre ĉe la pordisto. Mi rigardis en la granda gastolibro, kiuj ĉeestas. Estas eĉ iom ne agrable.

Turai: Kial vi timigas min? Kiu estas tiu?

Gál: Almády.

Turai: Ĉu la aktoro?

Gál: Jes.

Turai: Ĉu ĉi tie, en la kastelo?

Gál: Jes.

Turai: Tio estas vere malagrabla.

Gál: Nu, vidu!

Turai: Ĉu nun vi ĝojas?

Gál: Neniul mi ĝojas. Mi estas pesimisto, sed domaĝe, li estas honesta homo. Tio signifas, ke neniam mi ĝojas, se mi pravas. Tamen estas fakto, ke s-ro Almády ĉeestas.

Turai: Sed kiel li trafis ĉi tien? Jam ĉirkaŭ dek jarojn oni ne kutimas

inviti lin. Mi scias tiel, ke li somerumas kun siaj edzino kaj gefiloj ĉe Balatono. En sia vilao.

Gál: Nu, nun li denove igis sin inviti. Certe li havis kaŭzon por tio.

Turai: Ĉu la knabo scias tion?

Gál: La knabo scias nenion. Eĉ imagon li ne havas pri tio, eĉ nun ne, kion signifas s-ro Almády en la vivo de lia fianĉino.

Turai: Ba, lasu tion! Tiel multe li ne signifas... Dio mia... Li nur donis al ŝi lecionojn, instruis ŝin en la aktorlernejo... instruis al ŝi la ĝustan spiradon, kaj kiel oni kutimas diri: aperigi sian voĉon... Ba, lasu tion! La fama am-aktoro kaj la eta aktorlernantino! Kutima historio. Komprenblas de si mem. Ĝi daŭras kelkajn monatojn. Ba! Ĝi jam finiĝis delonge. Kaj Anjo estas multe pli saĝa. Kaj fianĉino. Ĉu vi havas imagon pri tio, kiel pasie aktorino kutimas senti, se iu fakte volas edzinigi ŝin? Kvankam mi ne estas ravita de ĉi tiu penso, sed min interesas nur, ĉu la knabo estas feliĉa aŭ ne. Ba, lasu la aferon! Ŝi estus freneza... se kun tiu komediinto... eĉ se li estas ĉi tie... Pripensu, famaliestro kun kvar infanoj! Ŝi havas pli da prudento.

Gál: Mi diris nenion. Mi nur volis diri, ke mi vidis lian nomon en la gastolibro ĉe la pordisto, do li loĝas ĉi tie. Ĉu tio estas agrabla? Ne. Tio estas malagrabla. Tion mi diris. Sed nun mi ankoraŭ diras ion: ni devus telegrafi, ke ni venos.

Turai: Tion vi jam diris matene. Bone. Refoje vi pravis.

Gál: Refoje mi ne ĝojas. Komprenu, virinon oni neniam surprizu. Ĉiufoje oni devas ĝustatempe telegrafi. Kiomfoje mi faris tiajn agrablajn surprizojn al damoj en la vivo, fine mi mem surpriziĝis. (*Oni frapas.*) Envenu!

Lakeo enpaŝas.

Turai: Kio okazis? Aha, nu jes. Ni petis konjakon.

Lakeo: Ĉu mi povas demandi, kiu estas la ŝatata marko de la s-ro doktoro?

Turai (*al Gál*): Mi petas vin, eniru por iom al la knabo, restigu lin ene... mi volus interŝanĝi kelkajn vortojn kun ĉi tiu... (*Kapgestas al la lakeo.*)... diri al li kelkajn vortojn.

Gál eliras.

Turai (*al la lakeo*): Kiel vi nomiĝas?

Lakeo: Ĉu mi?

Turai: Jes. Vi.

Lakeo: Johano Dvornicsek.

Turai: Kiom vi aĝas?

Lakeo: Kvindek du jarojn.

Turai: Kie vi naskiĝis.

Lakeo: En Podmokli, Ĉeĥio.

Turai: Ĉu edzigita, ĉu fraŭlo?

Lakeo: Mi estas edzigita. Mi havas du infanojn.

Turai: Pasintjare vi ankoraŭ ne servis ĉi tie.

Lakeo: Ne, sinjoro.

Turai: Ĉu ĉi-jare vi dungigis?

Lakeo: Nun, somere.

Turai: Dankon.

Lakeo (*tre modeste, post iom da paŭzo*): Mi petas pardonon, sinjora moŝto. Kial vi notis al vi la donitaĵojn?

Turai: Ne zorgu pro tio, mi ne estas detektivo. Mi malkaŝos tion fine. Do, Johano Dvornicsek, respondu al miaj demandoj! Ĉu en ĉi tiu najbara domo loĝas ŝia sinjorina moŝto Anjo Balogh?

Lakeo: Jes, ĝuste.

Turai: Ĉu ŝi ankoraŭ ne estas hejme?

Lakeo: Mi ne vidis ŝin hejmenveni.

Turai: Ĉu vi vidis ŝin foriri?

Lakeo: Ĉiuj foriris posttagmeze je la sesa horo.

Turai: Ĉu foriris? Kiuj foriris?

Lakeo: La tuta societo. Kune kun la grafa moŝto. Ili foriris ekskursi, mi kredas, al San Pietro.

Turai: Ĉu ĝi estas malproksime?

Lakeo: Unu kaj duonhoro per motorbarko. Ili forveturis per la granda motorbarko, dudek ses personoj. Malvarma vespermanĝo estas sur la ŝipo. Bonega bufedo.

Turai: Kaj kiam ili revenos?

Lakeo: Tre multe da drinkaĵoj troviĝas sur la ŝipo.

Turai: Ne tion mi demandis. Mi demandis, kiam ili revenos.

Lakeo: Mi ja respondis pri tio, sinjora moŝto. Ili kunprenis amason da drinkaĵoj: kvindek botelojn da ĉampano, dek ok botelojn da konjako, diversajn likvorojn kaj sesdek botelojn da biero. Ĉirkaŭ mateno ili revenos.

Turai: Kial?

Lakeo: Ĉar unue ili trinkos la tutan stokon.

Turai: Aha, do tiel. Kaj kiuj estas en la societo?

Lakeo: La plimulto, sinjora moŝto, por tiel diri, la plimulto estas usona familio. Malproksimaj parencoj de la ekscelenca moŝto. Ili postulas ekskursojn ĉiun festotagon.

Turai: Kiu festo estas hodiaŭ?

Lakeo: Mi ne scias, sinjoro. Ili havas feston dufoje ĉiun semajnon. Mi ne konas ĉi tiun religion. Ili foriras nokte diboĉi sur la maron. Ili adoras ŝian daman moŝton, la aktorinon. Ŝi kantas al ili sur la ŝipo. Kun ciganmuziko.

Turai: Ĉu estas ankaŭ ciganoj?

Lakeo: Kvar pecoj. Cetere ili muzikas ĉi tie, en la hotelo Corona d'Italia. Sed ili ne estas bonaj. Ciganoj valoras nenion sur akvo. Ciganoj bezonas grundon sub si.

Turai: Grundon. Jes. Kompreneble. Nu, ni iru plu. Ĉu vi konas s-ron Almády?

Lakeo: Ĉu Almády?

Turai: Aktoro. De la Nacia Teatro.

Lakeo (*ekkrie*): Kial mi ne konus lin, sinjoro? Kompreneble. Ĉu mi ne konus la s-ron artisto Almády? Li restadas ĉe ni jam la trian tagon.

Turai: Ĉu ĉi tie, en la kastelo?

Lakeo: Jes, en la malnova alo. Lia fenestro malfermiĝas al la ĝardeno.

Turai: Ĉu en ĉi tiu etaĝo?

Lakeo: Jes, sinjoro.

Turai (*agacite*): Kaj... ĉu ankaŭ ŝi kunveturis kun la societo?

Lakeo: Kompreneble. Li veturis kune kun ŝia dama moŝto.

Turai: Kiel? Ĉu ili veturis kune?

Lakeo: Nu... li akompanis ŝin sur la ŝipon. Kune... ili kutimas...

Turai: Kion fari kutime?

Lakeo: Nu... nur tiel, kiel kolegoj. S-ro Almády deklamas sur la ŝipo.

Turai: Kiel vi scias tion?

Lakeo: Marde mi servis sur la ŝipo.

Turai: Marde. Kompreneble, marde.

Lakeo: Ĝuste. Marde.

Turai: Mi ja scias, mi ja scias. Do... dankon.

Paŭzo.

Lakeo: Ĉu tiom?

Turai: Tiom.

Lakeo: Ĉar vi bonvolis diri, ke fine vi donos klarigon.

Turai: Kial mi notis viajn donitaĵojn?

Lakeo: Jes.

Turai: Lernu de mi, homo! Akceptu de mi kiel signon de mia dankemo, kiel saĝan konsilon: kiu prezentas sin, tiu ĉe konfeso malpli mensogas. Sentas respondecon. Ĉi tiu saĝaĵo troveblas en detektiva dramo, verkita de Gál kaj Turai.

Lakeo: Koran dankon.

Turai: Volonte.

Paŭzo.

Lakeo: Kaj nun, kiun specon vi bonvolas deziri?

Turai (distrite): Kiel, kiun specon?

Lakeo: De konjako?

Turai: Ho, jes. Pardonon. Mi ja alsonorigis vin por konjako. Do kiujn specojn vi havas ĉemane?

Lakeo: Sinjoro: ĉiujn, kiuj estas bonaj kaj francaj. Hennessy, Duoucé, Riviére-Gardrat...

Turai: Do plej bone estos, se vi alportos glason... (*Mallonga paŭzo. Ekstere frapiĝas pordo.*)

Lakeo (ekatentas): Pardonu, sinjoro! (*Levas la fingron.*) Pardonu! Mi kredas... Bonvolu resti silenta! Mi kredas, ke nun venas hejmen ŝia dama moŝto.

Ili alorelas. El la najbara ĉambro aŭdeblas, ke Anjo kantas kuraĝe, laŭte, per sonora voĉo operetaron.

Lakeo: Jes, estas ŝi.

Ili aŭskultas ŝian kantadon.

Turai: Brave! Estas ŝi! Feliĉe, bonhumore. Do, se tiel, mi ne bezonas konjakon, sed trovu ie glacimalvarman ĉampanon, kaj notu al vi unu- kaj ĉiufoje: mia hejma marko kaj ŝatata trinkaĵo estas Mumm, Cordon Rouge. Ek, movu vin, homo, iru, iru!

Lakeo: Ĉu mi portu ĝin ĉi tien?

Turai: Kompreneble, ĉi tien.

La lakeo forrapidas, la kanto plu aŭdiĝas.

Turai (*iom atentus*): Estas interese. Ŝi estas nia fianĉino kaj tamen kantas ion de Imre Kálmán. (*Kapskuante iras al la enireja pordo, malfermas ĝin kaj elvokas.*) Sinjoroj! Knaboj! Halt! Ne eniru en la bano-ĉambron! La anĝelo hejmenvenis! Ĉit! Vestu vin tuj! Ankaŭ vi! (*Eliras, ne videblas, nur aŭdeblas.*) Mi ja diras, ke ŝi alvenis! Rapide, rapide! Ĉampanon mi jam alportigis! Atendu, fileto, mi helpos!

La pordo fermiĝas. La scenejo restas malplena. El la najbara ĉambro por tempo ankoraŭ aŭdiĝas la kanto, poste silentiĝas. Tra la muro aŭdiĝas la sekvaj vortoj klare, laŭte, kompreneble el la najbara ĉambro.

Voĉo de Almády: Bonvolu diri, ĉu pro spito vi kantas? Ĉu vi volas provoki min?

Voĉo de Anjo: Mi kantas, ĉar mi emas kanti. Se vi volas provokiĝi, vi povas fari tion sendepende de tio.

Almády: Ĉu vi turmentas min: Turmentas? Turmentas?!

Anjo: Entute kia impertinenco, ke nokte vi nur tiel simple venas en mian ĉambron.

Almády: Mi envenis kun vi.

Anjo: Mi ne vokis vin.

Almády: Hieraŭ vi estis ĉe mi.

Anjo: Ĉar refoje vi minacis min per memmortigo kaj per tio, ke vi

ekstermos vian tutan familion. Notu al vi, ke por mi pli ol sufiĉas ĉi tiu komedio! Mia vivo prenis alian turnon. Mi estas fianĉino kaj volas far-iĝi honesta edzino. Estas plej impertinente, ke vi kompromitas min en ĉi tiu societo.

Almády: Ĉu mi kompromitas vin? Ĉu mi? Vin? Ĉu mi?! Vin?!

Anjo: Ankaŭ hodiaŭ dum la ekskurso. Nenian rajton vi havas por tio!

Almády: Ĉu mi ne havas rajton? Ĉu mi, kiu edukis vin? Ĉu mi, kun kiu vi travivis tiom da flamaj horoj, tiom da amaj, dolĉaj, neforgeseblaj...

Anjo: Ne estas vere! Ne neforgeseblajn! Forgeseblajn! Vi vidos, kiajn forgeseblajn! Iru for! Ne tuŝu min! Ĉu vi ne foriras? Vidu, estu saĝa kaj forveturu! Ne faru min nervoza! Mia fianĉo povos veni ĉiuhore.

Almády (*muĝe*): Mi mortigos lin!

Anjo: Vi ne mortigos lin. (*Almády laŭte ploregas. Mallonga silento.*) Ej nu, lasu tion, mi petas vin. Mi ne eltenas, se vi ploras. Bonvolu ne plori, estas terure! Plenkreska viro! Familiestro kun kvar infanoj!

Almády (*ploregante*): Sed se mi tiel terure amas vin!

Anjo: Vi tiel okulfrape suferas, Almády! Tion mi ne eltenas! (*Mallonga silento.*) Nu kio? Ĉu vi demetas vian jakon?

Almády: Estas tre varme al mi.

Anjo: Tuj reprenu vian jakon! Ej nu! (*Paŭzo.*) Tiel! Kaj nun foriru bele en vian ĉambron, lasu min dormi! Morgaŭ mi devos kanti dum la granda koncerto. Iru bele! (*senpacience*) Aŭskultu min, jam iru, ne estu sintrudema!

Almády: Bone, kara. Mi nur atendas, ĝis vi enlitiĝos. Ĉu vi tenas ĉi tie ian brandon?

Anjo: En la antaŭĉambro. Portu kun vi la tutan botelon! Sed nun jam iru tuj! (*Mallonga paŭzo. Ekkrie.*) Tie, tie, en tiu ŝranketo! Sed nun restu iom tie, ne alrigardu, dum mi surmetas la piĝamon! Fortunu vin!

Silento. La tri smokingaj sinjoroj piedpinte envenas.

Turai (*atentas*): Estas silente. Ŝi enlitiĝis!

Ādám (*subvoĉe*): Eble ŝi jam dormas.

Turai: Estas ekskludite. Venu ĉi tien! Tiel, al la muro.

Ili iras al la muro, sur kiu estas la interĉambra pordo. Tie ili enviciĝas, vizaĝe al la publiko.

Turai (*mallaŭte*): Atentu! Antaŭ ĉio ni trifoje krios: Anjo, Anjo, Anjo! Mi direktos.

Ili turnas sin al la muro. Turai levas sian brakon kiel dirigento ekdirekton. En ĉi tiu momento aŭdiĝas el la najbara ĉambroj jenaj vortoj:

Anjo (*kriante*): Ne, ne!

Granda gapmiro. Fulmorapide ili returnas sin.

Anjo: Kion vi volas? Ĉu rekomenci?

Granda teruro, ektimaj gestoj.

Almády (*kriante pasie*): Mi rekomencas! Jes ja, mi rekomencas! Mi amas vin, adoras vin, freneziĝos pro vi!

Ĉiuj tri terurite forkuras de la muro. Subite ili haltas kaj alorelas.

Almády (*muĝe*): Mi amas vin, kiel nuboskrapulo la nubon, kiu ŝvebas super ĝi, sed kun la unua vento forflugas! Mi ne povas vivi sen vi! Nek semajnon! Nek tagon! Nek horon!

La tri sinjoroj samtempe sidiĝas.

Anjo: Vi estas trompulo! Ĉi tiuj estas malplenaj vortoj.

Almády: Ne! Ne! Mi frenezas por vi! Sed vi misuzis min kaj elpremis min kiel citronon kaj nun vi volas forĵeti min!

Anjo: Kiu volas forĵeti vin, vi malsaĝa! Ne frenezu! Pli frue vi jam re-prudentiĝis. Venu ĉi tien, mi kisos vian belan, klasikan kapon. (*Kiso.*)

Almády: Tio ne estas kiso, tio estas trinkmono!

Paŭzo.

Ádám (*kaŝas sian vizaĝon en la manojn.*)

Gál: Ĉi tie nenio fareblas. Tio estas sunklara. Egalas pafon en la kapon.

Ádám (*flustre*): Tio estas vortoj! Tio estas voĉo! (*Ripetas kun dolora ironio.*) „Mi kisos vian belan, klasikan kapon.”

Transe.

Almády: Trinkmono!

Anjo: Ne bleku!

Almády: Sed mi blekas! Mi estas elpremita citrono! Mi estas citrono! (*plorante*) Eksciu la tuta mondo, ke mi estas elpremita citrono!

Turai kaj Gál kaptas al sia kapo.

Ádám: Dio mia! (*Ĵetas sin vizaĝe sur la tablon.*)

Transe.

Almády: Ho, ekflamanta memoro de niaj multaj amaj noktoj!

Silento.

Ádám (*fikse rigardante antaŭ sin*): Tiu estas Almády.

Gál (*timide*): Tio ne certas.

Turai: Azeno vi estas. La tuta lando konas ĉi tiun baritonon. Ĉu vi volas nei voĉon por muzikisto? Ĉi tie nenio helpas. Tio estas katastrofo.

Gál: Vendredo!

Transe.

Anjo: Niaj memoroj restos. Iru nun for!

Paŭzo. Turai paŝas al Ádám.

Transe

Almády: Ho, kiam mi vidas tion! (*Tre sensame.*) Ho, ĉi tiuj formoj! Ĉi tiu dia rozkolora haŭto! Ĉu ekzistas komparebla en la mondo? Ho, karesi ĝin!

Anjo: Malaperigu vin!

Almády: Ho! Kiel rondeta! Kiel glata! Velura! Bonodora!

Anjo: Ne, ne mordu!

Almády: Sed se tiel dezirinda!

Silento.

Gál (*mallaŭte*): Ni estus devintaj telegrafi.

Turai (*karesante la kapon de Ádám*): Foriru de ĉi tie, karega filo!

Transiru en nian ĉambron!

Ádám: Ĉi tiun virinon, ĉi tiun virinon mi tiom estimis kiel la Mado-non! Mi povus murdi tiun viron, kiu nun tenas ŝin en siaj brakoj... kare-sas ŝin!

Transe.

Almády: Bone, bone, mi scias, ke mi signifas nenion por vi.

Anjo: Kiel vi povas diri ion tian? Ne afliktiĝu tiom! Mi ĵuras al vi per ĉio, kio estas sankta por mi, ke en mia vivo viro neniam signifis tiel multe kiel vi. Tion mi ne forgesos nek malkonfesos. Ĉar vi estas viro, de la plandoj ĝis la verto, kiu scias tion, se ne mi!

Silento.

Gál: Grandega bonŝanco. Estis vaka ĝuste ĉi tiu ĉambro. Grandega bonŝanco. Kun granda protekto ni ricevis ĝin. Grandega bonŝanco. Piramo kaj Tisbe. "Ho muro, kara, aminda, dolĉa mur!" Jen ĝi!

Turai: Sufiĉe tiom da grakoj! Nun mi petas vin, tuj...

Transe.

Almády (*eligante kriegon*): He vi, mi suferas tiom kiel malsana ĉe-
valo!

Anjo: Nur tion ne diru, ĉar mia koro ŝiriĝos! Ne suferu! Ne staru tie tiel senesperigita. Venu al mi, kisu min, vi azeno!

Turai (*helpas al Ádám stariĝi*): Iru, filo, foriru de ĉi tie, eliru!

Ádám: Mia vivo rompiĝis.

Gál (*prenas Ádám sub la brakon*): Venu, karega filo! Mi diris, ke ni telegrafu. Venu! Vi dormos en nia ĉambro.

Ádám (*amare*): Ĉu dormi?

Turai: Elkonduku lin! Foriru! (*Forpuŝetas ilin eksteren. Tiuj eliras. Turai plu subaŭskultas.*)

Transe.

Almády: Ĉu adiaŭe mi povas kisi vin?

Anjo: Jes, sed tuj foriru!

Momenta silento.

Almády: Pri ĉi tiu kiso memoru ankoraŭ longe, tre longe!

Anjo: Tiu estis via malnova kiso. Varmega kaj dolĉa kiel brulanta punĉo. Sed nun iru bele en vian ĉambron! Estas terure, ke vi envenis. Iu povus vidi vin en la koridoro! Mi mortigos min, se mia fianĉo ion ekscios. Sed la kaŭzo de ĉio estas mia malsaĝa bonemo, ĉi tiu malsaĝa koro. Vi detruos min! Forveturu frumatene, per la unua trajno!

Almády: Nur unu vesperon ankoraŭ pasigu kun mi!

Anjo: Ne eblas. Vespere mi rolos dum la koncerto.

Almády: Malanoncu ĝin!

Anjo: Tion mi ne povas fari al la grafo. Forveturu! Ĉiuhore ili povos alveni. Tiu karega knabo kun tiuj du maljunaj friponoj. (*Turai faras geston.*) Ĉiutage mi atendas la telegramon. (*Turai ree faras geston.*) Forveturu! (*krie*) Kion vi volas? Ĉu vi volas malhelpi mian edziniĝon?

Almády: Bone, karega. Estos tiel, koro mia, kiel vi ordonas. Mi foriros. Kaj tagmeze mi forveturos. Ĝis, karulinjo. Nun permesu nur, ke lastafoje mi kisu vin!

Silento.

Turai: Ke la ĉielo falegu kun ĉiuj siaj fulmoj sur ĉi tiun obstinan friponon!

Transe.

Anjo: Sed nun iru!

Almády: Bonan nokton, dolĉa anĝeleto mia!

Anjo: Bonan nokton, vi azeneto!

Paŭzo, poste aŭdiĝas pordofrapigo.

Turai: Nu, finfine! Bonan nokton! (*Sidiĝas.*)

Paŭzo. Gál enpaŝas. Faras demandan geston.

Turai: Kion vi volas?

Gál: Kion signifas ĉi tiu silento?

Turai: Nur ne rikanu, vi eraras. Ĉi tiu estas tre bonmora silento. La

baritono foriris.

Gál: Kaj la anĝelo?

Turai: Kuŝiĝis dormi.

Gál: Sed unue ŝi kuŝiĝis nin. Sur ambaŭ ŝultrojn. Senmanke. Estis terure. Glata, rondeta, bonodora! Kaj li volis eĉ mordi. S-ro Almády kiel nuboskrapulo kaj kiel citrono.

Turai: Kie estas la knabo?

Gál: Mi kuŝiĝis lin. Piramo nun ploras en sia lito kiel kvinjara infaneto. „Ho muro, kara, aminda, dolĉa mur’.” (*Paŭzo.*) Citrono! Absurde!

Turai: Mi ne kuraĝas rigardi al li en la okulojn. Mi sentas min respondeca pro ĉi tiu katastrofo.

Gál: Tia misŝanco! Kompreneble, ni bezonis surprizon. S-ro Turai kun sia poetika fantazio. Jen al ni surprizo! Glata, rondeta, rozkolora, velura kaj bonodora! Kaj li eĉ mordi volis! La nuboskrapulo.

Turai: Iru en la inferon!

Gál: Pardonu min, kiu ajn flanko mi rigardas ĉi tiun katastrofon, de ĉie vi ŝajnas esti ties kaŭzinto. Pro kiu diablo vi bezonis ĝuste ĉi tiun ĉambron, apud la damo?

Turai: Mi volis, kio ŝajnis la plej bona.

Gál: Oni ne volu la plej bonan. Sufiĉas ankaŭ bona. Nun jen la rezulto. Estas nek fianĉino, nek amo, nek valso, nek opereto, nek primadono. Tamen la hundo restis viva, la kafo gustis bone kaj ni ricevis la ĉambron. Nu, sufiĉe turmentis nin ĉi tiu vendredo.

Turai: Mi nur bedaŭras la knabon.

Gál: Mi la knabon kaj la opereton. Absurde! Ŝi kisas lian klasikan kapon. Ĝuste la kapon. Kiu nun kantos ĉi tiun rolon?

Turai: Ba, min interesas nun la knabo. Kion diras la kompatindulo?

Gál: Li ploras.

Turai: Sed dume... ĉu li ne diras vortojn?

Gál: Li diras. Pli bone estas ne aŭdi ilin.

Turai: Kion li diras?

Gál: Li diras: „Mi ŝiros”...

Turai: Ĉu la virinon?

Gál: Ne ja. Pli malbone. La komponaĵon. Li diras: „Mi mortigos”...

Turai: Ĉu Almády?

Gál: Ne ja! La virinon. La rondetan, la bonodoran. Nun mi jam vere scivolas: se li ŝiros la muzikon kaj mortigos la primadonon, kiel ebligos el tio premiero?

Turai (*iom enpenŝiĝe, poste kun elano*): Premiero, jes ja, estos! Devos esti!

Gál: Ĉu post ĉio ĉi?

Turai: Post ĉio ĉi. Estu trankvila, estos premiero.

Gál: Ĉu kun ĉi tiu muziko?

Turai: Kun ĉi tiu muziko, kun ĉi tiu primadono, kun ĉi tiu komponisto. Tion diras mi al vi. Kaj estos ĉio. Ankaŭ geedziĝo, ankaŭ feliĉo.

Gál: Ba, vi optimisto! Anstataŭ tiaj aŭguroj vi pli bone farus, se vi proponus, kion oni povas nun fari! Ni alfrontas katastrofon.

Turai: Ja ĝuste.

Gál: Nu, famaj s-roj verkistoj! Nun ni ricevis taskon de la vivo mem! Nu, majstro! Jen al vi komplikita situacio. Ĝin bonvolu nun malimpliki, rearanĝi. Nu, vi granda famulo! Nun elcerbigu vian talenton! Nun montru, kion vi kapablas!

Turai: Mi provos. Portempe tamen gravas, ke la malfeliĉa knabo ne restu sola. Vi devas resti apud li. Jen lia saketo, donu ĝin al li, kaj alportu la mian. Dormos mi en ĉi tiu ĉambro.

Gál elportas la saketon. Turai enpenŝiĝe iradas tien-reen.

Gál revenas kun la saketo de Turai.

Turai: Kion li faras?

Gál: Li kuŝas kaj gapas en la malplenon.

Turai: Ĉu fikse?

Gál: Fikse.

Turai: Estas malbone.

Gál: Ho, kiom malbone! Li eĉ ne respondas al miaj demandoj.

Turai: Kion vi demandis de li?

Gál: Mi demandis, kiel vi fartas.

Turai: Bonvolu diri al mi, kion li devus respondi al tia stultega demando! En ĉi tiu situacio. Kompatinda infano.

Gál: Nu, ĉu vi havas ion por raporti?

Turai (*nervoze*): Kio, ĉu vi estas mia ĉefo? Ĉi tiu megalomanio jam komencas nervozigi min.

Gál: Nu, nu!

Turai: Kial vi superemas? Ĉar sur la afiŝo estas skribita „Gál kaj Turai” kaj ne „Turai kaj Gál”, ĉu vi jam kredas, ke mi estas via subalternulo?

Gál: Mi petas vin! Do kun omaĝo kaj humilo mi demandas, kio estas la solvo.

Turai: Mi ja skribos ĝin al vi sur la nazon! Vi fiaskigis mian sufiĉe bonan ideon per tio, ke vi fariĝis mia kunaŭtoro. Ĉi tion mi mem aranĝos. Sen kompano. (*Paŝas al la tablo.*) Mi petas de vi kelkajn informojn. Mi bezonas donitaĵojn. Elprenas krajonon.

Gál: Por tio mi taŭgas, ĉu?

Turai: Nur por tio. Kie restadas nun la edzino kaj familio de Almády? (*Tenas sian krajonon por notado.*)

Gál: Kiel mi scias, ĉe Balatono.

Turai: Ilia adreso?

Gál: Füred, vilao Coriolan. Ne nuboskrapulo.

Turai (*notas*): Kiel nomiĝas la patrino de Anjo?

Gál: Vidva s-ino Balogh.

Turai (*notas*): Kie ŝi loĝas?

Gál: Bulvardo Erzsébet n-ro sepdek.

Turai: Ĉu vi opinias, ke ŝi nun restadas en Budapeŝto?

Gál: Tion mi ne scias. Sed se...

Turai: Nu?

Gál: Nur nun enkapiĝis al mi: kial ni ne demandas ŝin pri ĉio ĉi? (*Montras al la najbara ĉambro.*) Mi havas la opinion, ke ni devus vekti ŝin.

Turai: Kial?

Gál: Ni devus rakonti al ŝi, kio okazis. Eble ŝi scipovos konsili. Virinoj scias en tiaj situacioj la plej surprizajn solvojn. Ni veku ŝin.

Turai: Dio gardu nin! Virinoj estas lertaj, se temas nei. Tio nun valoras neniom. La proprajn vortojn ŝi ne povas nei. Nek tiun sovaĝan voluptan atakon, kontraŭ kiu ŝi tiel malvigle defendis sin. Estas tamen

brave de ŝia flanko, ke ŝi malpermesis la mordojn. Kion ŝi povus prie malkonfesi?

Gál: Ŝi havas aliajn rimedojn. Genufalo, sveno, plorspasmo, ridspasmo, rigidspasmo, entute spasmo.

Turai: Spasmo, taŭga por ni, maljunuloj. Trans la kvardeka jaro, ĉefe ĉe teatro, oni ĝojas, se doniĝas tiel bona okazo por pardono. Sed ĉi tiu knabo estas dudek-kvinjara, kaj havas nenion komunan kun teatro. Estas senespere.

Gál: Do, ne ekzistas solvo.

Turai: Solvo troviĝas por ĉio, nur oni devas trovi ĝin.

Gál: He, tio estas bonega, rekte aforismo.

Turai: Notu ĝin ĉiuokaze. Kaj nun la ĉefa afero: tenere kaj tre prudente trakti la knabon. Sidu apud lia lito, ĝis li dormiĝos.

Gál: Li ne dormiĝos hodiaŭ.

Turai: Tiam donu al li dormigilon! Ĝis morgaŭ li devas satripozi. Lia animkvieto estas por ni...

Gál: Sukceso, negoco.

Turai: Malbelaj vortoj.

Gál: Kiel belaj ili estis ankoraŭ hieraŭ...

Turai: Nun iru kaj konfidu ĉion al mi! Mi transprenas la komandon. „Lasu min sola”, kiel oni diras en niaj teatraĵoj. „La nokto donos konsilon.” Fidu min! Kaj ĉefe bazu vian fidon sur tio, ke apenaŭ vi ne helpas al mi, mi tuj trovos la solvon eĉ de la plej malfacila situacio.

Gál: Akceptu mian elkoran, plej varman dankon!

Turai: Ne dankinde.

Gál: Bonan nokton!

Turai: Bonan nokton! Frumatene mi havu la feliĉon vidi vin. Ĝis tiam ne formovu vin de la knabo. Tio estas mia severa instrukcio. Mi havis la feliĉon...

Skuante la kapon, Gál foriras. Turai profundiĝas en pensoj. Frapoj sur la pordo.

Lakeo (*enpaŝas kun ĉampano, glasoj*): Mi portas la ĉampanon, sinjora moŝto.

Turai: Kian ĉampanon?

Lakeo: Mumm, Cordon Rouge, kiel vi bonvolis peti.

Turai: Aha, do tiel. Jes. Nu, tio estis antaŭ longe. Tre-tre longe. De tiam la mondo multe ŝanĝiĝis. Nu, estas egale. Ĉampanon mi neniam resendis dum mia vivo. Demetu ĝin!

Lakeo: Ĉu sufiĉos kvar glasoj?

Turai (*komandvoĉe*): Tri reen. Unu restas. (*La lakeo metas unu glason sur la tablon. Paŭzo. Turai gapas al la lakeo.*)

Lakeo (*modeste*): Mi vidas je viaj okuloj, sinjora moŝto, ke vi penas diveni mian nomon.

Turai: Ĝuste.

Lakeo: Dvornicsek.

Turai: Nu, jes. Do, Dvornicsek, vi povas iri dormi.

Lakeo: Por kiam vi ordonas la matenmanĝon?

Turai: Kioma horo estas nun?

Lakeo: La tria kaj kvarono. Jam mateniĝas.

Turai: Nu, ni diru... ĉirkaŭ la sepa... Cetere, mi sonorigos.

Lakeo: Kaj kion vi bonvolas matenmanĝi?

Turai: Nu... povas esti iom da ŝinko, ovaĵo, malvarma kokinaĵo, ia fiŝaĵo, rostbefo... salamo, langaĵo, sardino, lardo... fromaĝo, butero, lakto, mielo, marmelado... sekala pano, konjako... kaj teo.

Lakeo: Ĉu kun citrono?

Turai (*ekkrias*): Ne! (*mallaŭte*) Ne. Kun rumo.

Lakeo: Estos ĉio en ordo.

Turai: Diru, kiam vi propre dormas?

Lakeo: Vintre, sinjora moŝto.

Turai: Kaj somere?

Lakeo: Neniam.

Paŭzo.

Turai (*rigardas al la lakeo*): Kion vi volas?

Lakeo: Ĉu pliaj demandoj, sinjora moŝto?

Turai: Neniaj.

Lakeo: Ĉar mi volonte respondas, sinjora moŝto, pri ĉio, kio ajn

plaĉas al vi. Mi ŝategas tiajn gastojn, kiuj rigardas en mi ne la serviston sed la homon. Bonvolu ankoraŭ demandi? Tio varmigas mian koron.

Turai: Dankon. Por hodiaŭ mi jam scias ĝuste sufiĉe. Mi volus scii malpli multe.

Lakeo: Tiam mi deziras al vi trankvilan, bonan nokton, kara, bona sinjora moŝto!

Turai: Atendu iom, Dvornicsek! Kie preneblas ĉi tie leterpaperoj? Kaj mi bezonus ankaŭ telegraman blankon. Kaj plumo, inko?

Lakeo: En la biblioteko vi trovas ĉiuspecajn skribilojn, sinjora moŝto, sed mi povas ankaŭ alporti ilin...

Turai: Ne! Sed atendu... tio estas bona ideo. Mi skribos miajn leterojn en la biblioteko. Tie neniuj ĝenos min.

Lakeo (*ekiras*): Mi ŝaltos la lumon, sinjora moŝto.

Turai: Haltu! (*Montras al la ĉampano.*) Ĉi tiu... povas veni kun mi.

Lakeo (*prenas la glaciujon kaj la glason.*)

Turai: Nur iru antaŭe, amiko!

Lakeo: Mi kore dankas, kara, bona sinjora moŝto. (*Eliras.*)

Turai (*ĉe la tablo ankoraŭ ekbruligas cigaredon, ĵetas rigardon al la muro de la ĉambro de Anjo. Poste rapide eliras.*)

Kurteno

DUA AKTO

La sama ĉambro. Matene, la sekvan tagon. Sunas. Turai sidas ĉe la tablo, antaŭ li paperfolioj, kiujn li legas kaj kelkloke faras korektojn. La horloĝo batas la sepan. Li sonorigas. Stariĝas kaj disstreĉas sin. Frapoj.

Turai: Envenu!

Lakeo (*enpaŝas, portante la matenmanĝon sur grandega pleto*): Bonan matenon mi deziras, sinjora moŝto!

Turai: Bonan matenon!

Lakeo (*demetas la pleton sur la tablon.*)

Turai (*prenas ĵurnalon de la pleto*): Kio estas tio?

Lakeo: Ĵurnalo el Budapeŝto.

Turai: Ĉu vi jam legis ĝin?

Lakeo: Jes, sinjora moŝto.

Turai: Ĉu oni skribis ion pri mi?

Lakeo: Pri la sinjora moŝto oni ne skribis.

Turai: Tiam mi ne bezonas ĝin. (*Redonas la ĵurnalon.*)

Lakeo (*montras al la pleto*): Teo, lakto, rumo, ovaĵo, ŝinko, kokinaĵo, rostbefo, salmaĵo, salamo, langaĵo, lardo, sardino, fromaĝo, butero, mielo, marmelado, sekala pano, konjako, mustardo, salo, papriko kaj citrono.

Turai (*kolere elĵetas la citronon tra la fenestro*): Kial vi miras? Mi malŝatas ĉi tiun frukton. Cetere la matenmanĝo estas en ordo. Kiel eblas, ke vi nenion forgesis?

Lakeo: Ĉar mi ŝatas la sinjoran moŝton. Mi metis mian koron en ĉi tiun matenmanĝon.

Turai: Mi tre dankas. (*Okupiĝante pri la teo.*) Ĝi nun bone gustas.

Lakeo: Sinjora moŝto devis ne multe dormi.

Turai: Ne.

Lakeo: Mi same ne. Mi tiatempe kutimas iom somnoli.

Turai (*ĉe la teo*): Do vi tamen dormas.

Lakeo: Unu-du horojn. Tial mi ŝatas servi somere ĉe la maro. Ĉi tie ĉiuj ellitiĝas ĉe tagmezo. En montaro estas tre malbone.

Turai: Ĉu tie oni ellitiĝas frue?

Lakeo: Je la kvina. Kaj eĉ pli frue. Ĉar oni grimpadas inter la montoj kun grandaj bastonoj. Sed tie je la naŭa vespere ĉiuj dormas.

Turai: Refoje mi lernis ion.

Paŭzo. Turai trinkas teon.

Lakeo: Sinjora moŝto, estas vere terure, ke via moŝto ne atentassian sanon.

Turai: Ĉu mi? Ĉu mian sanon?

Lakeo: Jes. En la biblioteko mi trovis almenaŭ kvindek cigaredstumpojn en la cindrujo.

Turai: Tio estas eraro. Vi trovis precize tridek sep.

Lakeo: Ankaŭ tiom multas.

Turai: Vi, kiom vi fumas?

Lakeo: Dek kvin.

Turai: Vi longe vivos.

Lakeo: Dankon, s-ro instruisto.

Turai: Mi ne estas instruisto.

Lakeo: Ĉar vi bonvolis diri, ke mi longe vivos...

Turai: Plie mi nur deziras, amiko.

Lakeo: Dankon, sinjora moŝto! Mi volus plori, sinjora moŝto.

Turai: Kial?

Lakeo: En ĉi tiu nuna egoista mondo... tiel afabla homo kiel la sinjora moŝto. Ke ĉio interesas vin! Kion mi povus fari por la sinjora moŝto?

Turai: Nun, amiketo, la plejo, kiun vi povas fari por mi, estas, ke vi eliros kaj lasos min sola. Krome: kiu ajn serĉus min, mi dormas kaj oni ne devas ĝeni min. Ĉu bone?

Lakeo: Plej bone, sinjora moŝto. (Ekiras.)

Turai haltigas lin. Muta sceno: je la vizaĝo de Turai videblas, kvazaŭ li dirus: „Atendu, nun mi trudos min rememori vian nomon”. Sed tio ne sukcesas, Turai faras rezignan geston. La lakeo komprenas ĝin, ekridetas kaj alflustras: „Dvornicsek!” Poste li eliras. Turai fermas post li la pordon per ŝlosilo. Iras al la telefono, levas la aŭdilon al la orelo.

Turai: Ĉu la pordisto? Bonvolu ŝalti por mi la ĉambron de ŝia dama moŝto Anjo Balogh. (Atendas. Transe forta telefona sonorado. Paŭzo.

En si.) Ŝi dormas!

Transe refoje forta sonorado.

Anjo (*transe, kolere, kiel iu abrupte vekita*): Ha lo!

Turai: Ha lo!

Anjo (*kolere*): Kiu parolas?

Turai: Pardonu, ke mi vekis vin! Ĉi tie parolas Aleksandro Turai.

Anjo (*ekŝrike, feliĉe*): Aleksandro, Aleksandro!

Turai: Mi kisas vian manon.

Anjo: De kie vi parolas?

Turai: Vi surpriziĝos, Anjo. Mi parolas de la najbara ĉambro. En la gastoĉambro n-ro kvar.

Anjo: Kiel tio eblas?

Turai: Anjo, karega, mi ĉion klarigos, sed nun temas pri tre urĝa kaj grava afero.

Anjo: Dio mizerikorda, ĉu okazis io malfeliĉa?

Turai: Jes ja. Estas ia implikaĵo.

Anjo (*krie*): Pro Dio, ne timigu min! Kio okazis?

Turai (*demetas la aŭdilon, respondas sen telefono*): Vi ne bezonas ektimi. Sed mi petas vin..., (*Dume ekfumus.*) ...ke tuj transvenu al mi. Tuj!

Anjo: Ĉu nun tuj?

Turai: Nun tuj. Malfermu la pordon, kiu malfermiĝas en ĉi tiun ĉambron! Surmetu ian negliĝon!

Anjo: Kion mi faru?

Turai: Surmetu ian negliĝon!

Anjo: Mizera estas ĉi tiu telefono. Tiel malbone aŭdeblas.

Turai (*iras proksime al la muro*): Surmetu ion kaj transvenu tuj! Ĉu nun vi aŭdas min?

Anjo: Nun mi bone aŭdas vin. Tuj mi venos.

*Paŭzeto. Poste ŝlosilo turniĝas en la seruro. La pordo malfermiĝas,
Anjo enpaŝas en matena negliĝo.*

Turai: Bonan matenon! (*Fermas la pordon.*)

Anjo: Pro Dio, Aleksandro, mi konjektas ion malbonan. Kio okazis?

Kiel vi venis ĉi tien? Kiam vi venis? Kial vi ŝlosis la pordon?

Turai (*kisas ŝian manon*): Bonvolu sidiĝi, Anjo! Mankas tempo por superflua babilado.

Anjo: Kio okazis, pro Dio?

Turai: Sidiĝu!

Anjo: Kial mi sidiĝu?

Turai: Ĉar mi ne volas, ke vi sidiĝu de tio, kion mi estas dironta. Prefere tiel, pro komplezo. (*Tenere trudas ŝin en la fotelon.*) Karega Anjo! Malgraŭ tio, ke vi estas la fianĉino de mia juna amiko, vi ankoraŭ havas rilaton kun Almády.

Anjo: Tio estas impertinenta mensogo.

Turai: Temas pri io alia. Mi kredis, vi diros, ke mi havas nenion komunan kun tio.

Anjo: Tion mi ne povas diri, ĉar vi estas la infanisto aŭ kuratoro kaj amiko kaj protektanto kaj, mi ne scias, kio de Adalbeĉjo. Kaj mia aŭtoro kaj amiko. Mi povas nur diri, ke tio estas mensogo kaj kalumnio.

Turai: Tiam estas bone. Ĉar tiel mi scipovas al vi respondi. Mi restadas en ĉi tiu ĉambro jam de hieraŭ vespere. Kaj ĉi tiu muro estas mal-dika kiel papero.

Anjo: Sankta Ĉielo!

Turai (*trankvile*): Citrono.

Anjo (*kovras ŝian vizaĝon*.)

Turai: Citrono. (*Paŭzo.*) Nuboskrapulo. Ej nu, karega Anjo. Mi vidas, vi estas saĝa virino. Ni parolu, kiel decas al du viroj. Ĉi tie necesas urĝe ripari.

Anjo: Se vi aŭdis ĉion, vi aŭdis, ankaŭ kion mi diris!

Turai: Mi aŭdis ĉion.

Anjo: Tagmeze li forveturos. Mi por ĉiam elĵetis lin. Kaj nun vi, se vi, kiel mi supozas, silentos pri tio, tiam...

Turai: Ni ne hastu tiom, mi petas vin. Se la afero estus tiel simpla, vi neniam estus eksciinta de mi, ke mi aŭdis vin ambaŭ. Ĉi tie la tubero estas pli dika.

Anjo (*refalas en la fotelon*): Dio mizerikorda!

Turai: Mi vidas, ke vi konjektas la aferon.

Anjo: Mi eĉ ne kuraĝas eldiri.

Turai: Eldiros mi. Jes, ankaŭ la knabo aŭdis ĉion.

Anjo: Ĉu do ankaŭ li estas ĉi tie?

Turai: Jes.

Anjo: Kie?

Turai (*mallaŭte*): Tie. Li dormas ĉe s-ro Gál. Kaj nokte ankaŭ li ĉeestis kun ni en ĉi tiu ĉambro, kiam vi transe...

Anjo: Mi enprenos la tutan veronalon, kiun mi havas ĉe mi.

Turai: Tion estas malmulte.

Anjo: Dek gramoj.

Turai: Ne la veronalo estas malmulta. Via morto estas nesufiĉa por la solvo.

Anjo: Mi transvivos nenian solvon. Restis nur du ebloj: aŭ morti, aŭ nei ĉion.

Turai: Retrankviligu, karulino! Per ekscitiĝo ni atingos ne multe. Se tion oni povus nei, mi ne lacigus vin veni ĉi tien. Jam ĉio estus delonge neita.

Anjo: Restas la veronalo.

Turai: Ĝuste. Restas ĝi – en la skatolo. Nun mi petas vin, lasu min trankvile fari disponojn!

Anjo (*plorante*): Ja vi scias plej bone, kiom mi amas ĉi tiun knabon! Mi iĝis alia virino, de kiam mi konas lin! Li estimas min kiel la Mado-non! Kaj li pravus, ĉar mi de tiam puriĝis, kredas esti ĝustaloke en mia kariero, mi estis feliĉa, mi estas enamiĝinta...

Turai: Vi tamen trompas lin.

Anjo (*malespere*): Kiel vi povas aserti ion tian? Mi estas viktimo de mia boneco. Vi ja scias, ke la afero kun ĉi tiu mizera Almády daŭris eble nur du monatojn... Por la ĝusta spirado kaj ke mia voĉo aperu, kaj krome dankemo kaj mi ne scias, kio... Mi jam kredis, ke mi liberiĝis de li. Sed la malfeliĉa estas tiel obsedita, kaj tuj li esploras. Mi ne povas tion rigardi. Li estas la plej sintrudema homo en la mondo. Kion mi faru kun li? Mi ĵuras, tio hieraŭ estis nur speco de postvibroj.

Turai: Mi en via loko jam delonge ne vibrus. Sed estas egale, tio jam okazis. Nun ni vidu, kiel ni elrampu el ĉi tiu peĉo.

Anjo: Aleksandro! Aleksandro! Ĉu eblas?

Turai: Eblas. Ne por via ĝojo, infano mia. Ĉar vi meritas esti kvar-onumita, ŝtiparumita kaj ke via cindro estu disŝutita al ĉiuj ventoj. Sed por la feliĉo de ĉi tiu senkulpa, bona knabo. Se al tia knabo rompigas la koro, li finiĝas. Jes, jes, kara Anjo. Mi emus vin plej serioze alvoki, bonvolu profunde honti.

Anjo: Sed kiel eblus nun ripari?

Turai (*iras al la telefono*): Tuj vi ekscios. Vi ne havos ĝojon pri tio. Sed ĉiu medikamento estas amara. (*Metas la aŭdilon al la orelo.*) Ha lo! Kara s-ro pordisto, bonvolu ŝalti ĉi tien la ĉambron de la s-ro aktoro Almády!

Anjo (*ektime*): Kion vi volas de li?

Turai (*ne respondas. Atendas. Poste ree parolas en la telefonon*): Ne gravas, eĉ se li malpermesis, bonvolu forte alsonorigi. Temas pri vivdanĝero.

Anjo: Kion vi volas de li?

Turai (*en la telefonon*): Ĉu s-ro Almády? Bone, bone. Jes, kompreneble, la pordisto diris, ke oni ne ĝenu vin. Sed mi petas vin, ni ne diskutu. Ĉi tie parolas Aleksandro Turai. Jes, jes. Mi estas ĉi tie en la kastelo. Jes, hodiaŭ nokte, per aŭtomobilo. Bonan matenon! Des pli bone, se vi jam estis maldorma. Do, mi petas vin, bonvolu tuj veni al mi, mia ĉambro havas la numeron kvar. Sed en ĉi tiu momento. Jes, diris mi, ke temas pri vivdanĝero. Sed nun mi korektas: estas danĝero de morto. Jes. Jes. Sed tuj. Bone. (*Remetas la aŭdilon.*)

Anjo (*stariĝas, ekiras.*)

Turai: Kien vi iras?

Anjo: Sed se li venis ĉi tien...

Turai: Nur restu! (*Malŝlosas la enirejan pordon.*)

Anjo (*plorante*): Li suprenrigardas al mi kiel al sanktulo! Por li mi estas la plej pura, la plej sankta! Daŭre li nomas min Madono.

Turai: Nu, vidu!

Anjo: Sed kiel reagos la malfeliĉa?

Turai: Eĉ ne demandu tion!

Anjo: Estas terure! Kaj kion vi propre volas fari? Kial vi ne malkaŝas tion?

Turai: Pacienco!

Anjo: Kia impliko! Ĉio, ĉio pro mia malsaĝa bonemo!

Paŭzo, poste frapoj.

Turai: Envenu!

Almády (*enpaŝas*): Bonan matenon! (*Mirante rigardas al Anjo.*) Mi kisas vian manon. Ĉu vi, ĉu ĉi tie?

Turai: Ŝi jes, ĉi tie. (*Ŝlosas la pordon.*)

Almády: Kio do? Ĉu io okazis?

Anjo: Sidiĝu!

Turai: Li sidiĝos, ne indas zorgi pro li.

Almády (*al Anjo*): Bonvolu pardonu min... sed mi estas iom nervoza.

Turai: Ĉu glason da konjako?

Almády: Dankon, matene neniam.

Turai: S-ro Almády! Estante homo kun familio, vi persekutas per via amo la fianĉinon de alia homo.

Almády: Tio estas kalumnio.

Turai: Mi kredis, vi diros, ke nenion komunan vi havas kun tio. Pri tio vi pravus. Sed kalumnio – tio estas troigo.

Almády (*agrese*): Ĉi-foje kaj por ĉiufoje mi rifuzas, ke...

Turai (*energie*): Silenton! Citrono.

Almády (*sidiĝas senvorte.*)

Turai: Mi diris, ke vi sidiĝos. (*Paŭzeto.*) Ni transiru rapide al la temo. Mankas tempo. Mi volas reordigi la aferon.

Almády (*rigardas la muron.*)

Turai: Vi pravus. Ĝi estas maldika kiel papero.

Almády (*stariĝas*): Kiel ĝentlemano mi petas vian honorvorton, diskretecon.

Turai: Residiĝu!

Almády (*sidiĝas, scivole, time*): Kio? Kio plia ankoraŭ?

Turai: Ankoraŭ io. Ĉu vi sidas?

Almády: Jes.

Turai: Nu, ne nur mi aŭdis ĉion. Ankaŭ la fianĉo aŭdis ĉion. Ankaŭ li ĉeestis en la ĉambro.

Anjo (*sufokite ekploras.*)

Almády (*raŭke*): Mi petas konjakon.

Turai (*dum verŝas por li*): Ĉu matene?

Almády: Matene, ĉiufoje. (*Trinkas.*)

Anjo: Kion vi nun faros, vi fripono? Ĉu vi vidas, kion vi faris al mi? Vi pelas min en memmortigon! Dio mia! Morti! Morti!

Almády (*heroe*): Kune! Ni ambaŭ kune!

Anjo: Mi ne bezonas vin! Nek en la morto mi bezonas vin! Kion vi nun faros? Nun skrapu la nubojn, vi... vi... (*Ploras.*)

Almády: Mi staras je la dispono de la sinjoro.

Turai: Brave! Nenio mankis, nur tio. Vi faros nun, kion mi ordonos.

Almády: Ĉu vi ordonos?

Anjo: Silentu! Jes ja, li ordonos. Parolu, mi petas vin. Li trumpetos ion ajn, vi nur parolu!

Almády: Ĉu mi trumpetas? Ĉu vi kvalifikas mian baritonon trumpeto?

Turai: Lasu vian baritonon! Ĝoju, ke mi eltiros vin el ĉi tiu peĉo! Vi estas edzigita. Familiestro. Kun kvar infanoj. Etaj citronoj hejme. Mi instruos al vi la morojn! Ankoraŭ plia vorto, kaj mi enpoŝtigos al via edzino la telegramon kun ĉio, kio estas tie skribita. Kaj nun atentu min vi ambaŭ!

Almády (*ree rigardas la muron.*)

Anjo: Lin atentu! Ĝin vi jam vane rigardas. Hieraŭ vi devus pli bone rigardi!

Turai: En tiu ĉambro hieraŭ nokte okazis, ke...

Anjo (*nervoze*): Mi petas vin, ni scias, kio okazis.

Turai: Vi ne scias. Nun vi ekscios. Okazis tio, ke vi lernis rolojn. Ĉu vi komprenas?

Anjo: Ĉu nokte?

Turai: Jes, nokte.

Almády: Kiel vi komprenas... ke ni lernis rolojn?

Turai: Tiu laŭta dialogo, kiu transaŭdiĝis ĉi tien, estis rolo, kiun vi du lernis, parkerigis. Ĉu vi komprenas?

Anjo: Mi jam komprenas. Ĉu vi ne komprenas, vi malsaĝa?

Almády: Mi komencas.

Anjo: Ho, kiel bonege! Ho, vi, kara kapo kun multtorda cerbo!
(*Volas kisi Turai, sed recedas.*)

Turai: Nu, kio?

Anjo: Estas tubero. Li ne kredos tion.

Turai: Kial li ne kredus?

Anjo: Ba! Kie troviĝas teatraĵo, en kiu... estas tiaj roloj?

Turai: Kie? (*Paŝas al la skribotablo.*) Jen! (*Montras al fasko da folioj.*)

Anjo: Kiel?

Turai (*rearanĝas la faskon*): Jes. Jen estas tiu teatraĵo. Jen ĉi tiu.

Anjo: Kiu verkis ĝin?

Turai: Mi. Ne gapu, karulinjo, per viaj puraj, bluaj okuloj! Prefere demandu, kiam mi verkis ĝin! Hodiaŭ nokte. De la kvara horo ĝis la sesa. Kion mi aŭdis, mi tuj surpaperigis. Oni estas aŭ dramaturgo aŭ ne dramaturgo. Mallonga, unuakto peco, ne pli stulta ol la ceteraj. Ĝi an duonon mi aŭdis tra la muro, la alian duonon mi alverkis. Ĉiu batalas per la propra armilo dum la vivo. Mi batalas per mia plumo. Nun mi sentas min kiel cirka akrobato, kiu uzas hazarde sian lertecon foje por savi vivon. Kun pli pura intenco homo ankoraŭ ne verkis pecon. Estas domaĝe, ke per tio mi savos ankaŭ nian komunan opereton, ĉar ĝi signifas materialan utilon. Sed ne gravas, mi suferos ankaŭ tion. Se temus nur pri la feliĉo de du homoj, la ideo estus pli bela. Sed ankaŭ tiel ne malbela. Kaj nun: ne gapi, sed tuj transpreni, kunpreni, ellerni kaj ludi ĝin!

Anjo: Ĉu ludi?

Turai: Jes ja! Nur per tio eblas vere pruvi, ke tio, kion vi transe dialogis... estis du roloj. Hodiaŭ posttagmeze ĉefprovo. Hodiaŭ vespere premiero.

Almády: Ĉu hodiaŭ vespere? Kie?

Turai: Malsupre en la granda salono, dum la hodiaŭa granda koncerto. Post la vespermanĝo, kiel vi scias, okazos granda koncerto. (*al Anjo*) Vi jam eras en la programo.

Anjo: Jes, mi volis kanti kelkajn kanzonojn. Kaj li deklamos poemojn de Petőfi.

Turai: Do okazos eta programŝanĝo. Vi ne kantos, kaj li ne deklamos, sed vi du kune prezentos malgrandan komedion. Mallongan unu-aktan. Ĉu gravas?

Anjo: (*rigardas en la manuskripton*): Sed kiel mi ellernos ĝin ĝis la vespero?

Turai: Ej nu, nokte vi ja perfekte prezentis ĝin.

Almády (*suspiras profunde.*)

Turai: Kio vin trafis?

Almády: Mi senpeziĝis. S-ro Turai, ĉu vi konas mian edzinon?

Turai: Ĉu mi do ne diris en la telefonon, ke estas danĝero de morto?

Almády: Dankon! (*Volas premi al li la manon.*)

Turai (*ne akceptas lian manon*): Mi faris tion ne por vi, kara amiko. Eĉ, se eblus, mi lasus vin en la peĉo. Sed, domaĝe, la afero estas tiel komponita, ke vi aŭtomate elrampas el ĝi.

Anjo: Diru...

Turai: Nu, kia plua tubero?

Anjo: Tuberas tio, kial ni lernis ĝin ĝuste nokte je la tria?

Turai: Tion ankaŭ mi demandas. (*Anjo kaj Almády faras honteman geston.*) Sed mi ankaŭ respondas tion. Ĉar estis urĝe. Ĉar hodiaŭ vespere estos la prezentado.

Almády (*nervoze*): Do ni jam iru kaj lernu. Mia kapo estas malforta. Ni iru.

Anjo (*ploras.*)

Turai (*ĉe la telefono*): Ankoraŭ minuton. Nur ĉion trankvile! Kiu aranĝas la koncerton.

Anjo (*plorante*): La sekretario.

Turai: Vi nun bonvolas anonci al la sekretario ĉi tiun programŝanĝon! Ha lo! Mi petas la kontoron de la sekretario. (*Transdonas la aŭdilon al Anjo.*)

Anjo (*plorante transprenas ĝin*): Sed kion mi diru?

Turai: Nur trankvile. Mi sufloros.

Anjo (*ĉesas plori.*)

Anjo (*en la telefonon*): Ha lo! Kiu parolas? Ĉu la s-ro sekretario? (*Rigardas al Turai.*)

Turai (*flustre*): Bonan matenon!

Anjo (*sen ĉia transiro buntigas sian parolon per petolaj, sonoraj ekridoj*): Bonan matenon, plej dolĉa sekretario de ĉi tiu mondo! Okazos iom da programŝanĝo, pri kiu, mi kredas, ĝojos ankaŭ la gastaro. Ne sola mi sursceniĝos, sed kune kun s-ro aktoro Almády. Ni ludos al vi spritan, ravan, bonegan par-scenon. (*Turai klinas sin.*)

Anjo (*atentas en la telefonon, poste turninte sian vizaĝon al Turai, parolas*): Kia peco?

Turai: Franca.

Anjo (*en la telefonon*): Franca komedio. (*Rigardas ree al Turai.*) De kiu?

Turai: Géraldy.

Anjo: Mi kredas, de Géraldy. Ĉu jes? Brave!

Turai: Kion li diras?

Anjo: Li diras, ke li ŝategas Géraldy. Li konas ĉiun lian teatraĵon.

Turai: Hu! Tiam ne! Ne! Tiam verkis ĝin Sardou!

Anjo: Pardonu, nun mi vidas, ke mi eraris. Ne Géraldy skribis ĝin sed Sardou.

Turai: Victorien Sardou!

Anjo: Victorien Sardou. Jes. (*al Turai*) Li diras, ke de tiu li konas nur Nora.

Turai: Bone. Tian homon ni bezonas.

Anjo (*en la telefonon*): Tian homon ni bezonas.

Turai: Ne! Tio estis privata.

Anjo: Estis privata! Ĝis, karulo! Ĝis revido, kara! Saluton, vi dolĉa! (*Daŭre ridas.*) Kompreneble, aminda! Tre volonte, karulĉjo! Vi estos la sufloro. En ordo. Kompreneble. Pardonon? Kio estas ĝia titolo? (*Rigardas en la manuskripton.*) Denton por dento. Ĝis revido. (*Demetas la aŭdilon. Sen transiro, subite, laŭte ekploras. Plorante demandas.*) Diru, kial franca estas la peco?

Turai: Por ke oni ne povu trovi ĝin en tiu amasego da franca literaturo. Por konfesi sincere, en mia vivo mi tiel multe ŝtelis de la francoj, decas, ke fine mi ankaŭ donu ion al ili. Nu, sed nun permesu al mi aplombe esprimi min! (*ameme*) Marŝ! Lerni! (*al Almády*) Kaj vi tuj ko-

piu la teatraĵon, por ke neniu rekonu mian skribon!

Almády: Ĉu unufoje?

Turai: Almenaŭ.

Almády: Vi pensas pri ĉio!

Turai: Ne tiel, kiel kelkaj tropikaj fruktoj.

Anjo (*kiu ĉesis plori kaj nun legas la manuskripton*): Jam komence ĝi ne estas bona.

Turai: Kial? Kie?

Anjo: Jen ĉi tie. Mi ne diris al li, ke „via kiso estas abomena.” Mi bedaŭras, sed mi diris: „Via kiso...”

Turai: „...dolĉa kaj varmega kiel brulanta punĉo.” Mi scias. Mi aŭdis. Sed feliĉe, tion la knabo jam ne aŭdis, ĉar ni elpuŝetis lin.

Almády: Kaj se estas permesite al mi demandi, kial estas abomena mia kiso?

Turai: Tio estas jam en la dua parto, kiun mi alskribis al la vera.

Almády: Sed kial estas abomena mia kiso?

Turai: Por mi abomena. Tio estas mia poeta opinio pri via kiso. (*Puŝetas ilin al la pordo.*)

Anjo: Tio estas terura! Ĉu vi ne povis fari bruon aŭ tusi, kiam tio transaŭdiĝis? Doni ian signon?

Almády: Tusi! Efektive... Tusi!

Turai: Diru, amiko, tiam nun kion mi farus? Jam la unuaj vortoj estis tre teruraj. Nun ĉio estus perdita.

Almády: Mirinda cerbo!

Turai: Ne flatu!

Anjo: Vi pravas. Kaj ĉu jam en la unua minuto vi ekhavis la ideon?

Turai: Ne. La ideon donis vi.

Anjo: Ĉu mi?

Turai: Jes. Mi ĉiufoje supozas ion bonan. En la unua minuto mi fakte kredis, ke vi lernas rolon. Poste eklumis al mi, ke ĝi estas la realo mem.

Anjo: Pro kio vi pensis, ke tio estas rolo?

Turai: Tiel false vi diris tion. Sen konvinkiĝo. Aparte la amkonfeson.

Anjo: Ĉar mi ne amas lin. (*De nun tre rapide.*)

Almády: Ĉu vi ne amas min?

Anjo: Ne.

Almády: Do vi mensogis nokte.

Anjo: Mi mensogis.

Almády: Por nur liberiĝi.

Anjo: Jes. Mi malamas vin.

Almády: Serpento!

Anjo: Mi povus mortigi vin!

Almády (*ekploras.*)

De nun ree normale.

Turai: Halt! Sufiĉas! Ĝuste ĉi tio mankas! (*al Almády*) Mi atentigas vin, al mi vi povas plori, mi rekte ŝatas tion rigardi.

Almády: Kaj el kio vi divenis, ke tio estis ne rolo sed realo?

Turai: El tio, ke vi kondukis nevirece. Tian rolon aŭtoro ne verkas al amheroo.

De nun tre rapide.

Almády: Ĉu mi nevireca?

Turai: Jes, kaj kiagrade!

Almády: En mia situacio...

Turai (*sonore*): Sufiĉas!

Almády (*subite mildiĝas*): Sinjoro!

De nun ree normale.

Turai: Ĉiuminute povos alveni miaj amikoj. Bonvolu foriri, lerni, la tempo estas mallonga. (*Al Anjo, kiu foliumas la manuskripton.*) Kaj ĉefe tiun parton ellernu precize!

Anjo: Kiun? (*Ankaŭ Almády rigardas en la manuskripton.*)

Turai (*montras*): Ĉi tiun teruraĵon... kiun ni jam aŭdis nokte... jen ĉi tie...

Anjo: (*rigardas ĝin*): Interese, mi jam apenaŭ memoras ĝin.

Turai: Sed mi bone. Kaj ankaŭ via fianĉo ne forgesos ĝin.

Anjo (*legas*): „Mi amas... amas vin kiel nuboskrapulo la nubon, kiu ŝvebas super ĝi.” (*Almády honteme fortunigas sin.*) „Vi estas trompulo!

Ĉi tiuj estas malplenaj vortoj.”

Almády (*legas*): „Sed vi misuzis min kaj elpremias min kiel citronon.”

Anjo: Jes, jes... nun mi jam memoras. Vi hontu!

Almády: Interese. Li laŭvorte skribis ĉion.

Turai: Ĉi tiun parton mi substrekis per ruĝa krajono. Tri tutaj paĝoj. De ĉi tie... de la dek-sesa paĝo... ĉi tie ankoraŭ plu... „Venu ĉi tien, mi kisas vian belan, klasikan kapon.” ...kaj ĉi tie plu... kaj ĉi tie estas la plej terura parto, ĉi tiu volupta, sensama kriego, kiu ŝajne pariĝis kun aŭdacaj manmovoĵoj. (*Galope legas ĝin.*) „Ho, ĉi tiuj formoj! Ĉi tiu dia rozkolora haŭto, ho, karesi ĝin...”

Anjo: Sed ja mi...

Turai: Tamen, tamen! (*Legas plu.*) Vi diris: „Malaperigu vin!” Sed li ŝajne ne foriris, ĉar tiel li ekkriis: „Ho! Kiel rondeta! Kiel glata! Velura!” Eĉ, ŝajnas, li alŝovis ankaŭ sian nazon, ĉar li diris ĉi tion: „Kiel bonodora!” Ĉu okazis tiel?

Anjo: Sed Aleksandro, mi...

Turai: Vi silentis, Anjo. Ni ne diskutu. Vi silentis, poste ekkriis: „Ne, ne, ne mordu!” (*Ambaŭ honteme forturnas sin.*) Jes, jes. Hontu! (*Redonas al ili la manuskripton.*) Kaj nun ek. Kopii kaj ellerni ĝin! Ĉi tiuj estu tiuj du roloj, kiujn en via vivo plej precize vi ellernos. Vespere je la oka ĉefprovo ĉi tie, en mia ĉambro. Mi aŭskultos vin. Kaj post la vespermanĝo la premiero okazos je la deka en la granda salono. Kaj nun...

Anjo: Marŝ! Eksteren! Ĉu?

Turai: Ĝuste. Kaj atentu: jam de tri monatoj ni eĉ ne vidis nin.

Almády (*forirante*): Kiel impona cerbo! (*Kun Anjo eliras en la najbaran ĉambron.*)

Turai malfermas la enirejan pordon, eliras, poste revenas kun Gál. Sidigas al la matenmanĝo kaj komencas manĝi. Dum la sekvaj minutoj li trankvile, malrapide manĝas kun bona apetito.

Gál: Ĉu jam delonge vi eksterlitas?

Turai: Mi ne povis dormi. (*Manĝas.*) Kio nova pri la knabo?

Gál: Nun li vekigis. Vestas sin.

Turai: Ĉu vi jam matenmanĝis?

Gál: Eĉ gluto ne glitis tra mia gorĝo. Mi envias vin, ke al vi tiel multe glitas kaj tiel glate. (*Rigardas lin.*) Vi sidas ĉi tie kaj manĝas, kvazaŭ nenio estus okazinta. Ĉu vi do ne scias, ke ni estas detruitaj? Mi jam estas malsana pro ĉi tiu okazintaĵo.

Turai: Ĉu la knabo dormis iom?

Gál: Ĉe frumateno li dormiĝis pro la multa plorado. (*Rigardas en spegulon.*) Mi estas pala.

Turai: Ĉu li ne parolis?

Gál: Ne. Li gapis fikse al la plafono. Tio estas tre malbona.

Turai: Ĉu al la plafono? Kial malbona? La muro, ĝi estas malbona.

Gál: Mi propre ne komprenas, kiel oni povas tiel konstrui.

Turai: Nu, tiel malproksimen ni ne retroiru.

Gál: Mi petas vin, ne manĝu konstante! (*Rigardas en la spegulon.*) Terure, kiel pala mi estas. Nu, kio novas pri via solvo?

Turai: Nu, vidu, ekzistas pluraj ebloj. Ĉiujn mi trapensis nokte. (*Montras al la tablo.*) Telegramoj, leteroj kuŝas pretaj. Sed fine mi elektis la plej simplan.

Gál: Nome?

Turai: Mi faros ĉion eblan, por ke Almády rompu sian rilaton al ĉi tiu virino.

Gál: Kial?

Turai: Ĉar tio estas la plej certa maniero de tio, ke la gejunuloj ree kuniĝu.

Gál: Ĉu tion vi elpensis nokte? Ĉu simple el ĉi tiu kapo? Ĉu tute sola? Sen mi! Ĉu tion?

Turai: Jes, tion.

Gál: Gratulon! Vidu, jam de jaro mi rimarkas, ke viaj mensaj kapabloj timige reduktiĝas. Ankaŭ nia lasta opereto fiaskis pro tio, ke vi enskribis psikologion. Krome mi observis, ke dum parolado vi daŭre konfuzas la konsonantojn. Vin trafis io misa. Vi komencas fariĝi poeto. Vi detruos vin materiale, eĉ min. Ĉu vi do ne sentas, ke en la vivo de ĉi tiu knabo tio, kio okazis, estas tia plago, tia katastrofo, ke...

Turai: Ps! (*Atentas, poste montras al la enireja pordo.*) Atentu! Li venas.

Ádám (*enpaŝas. Paŭzo. Senvorte preteriras ilin.*)

Turai: Nu, karega filo, ĉu vi eĉ ne salutas? Bonan matenon!

Ádám (*velke*): Bonan matenon!

Gál: Ĉu vi matenmanĝis, filo?

Ádám: Ne.

Turai: Ĉu vi dormis?

Ádám: Ne.

Turai: Mi same ne.

Ádám (*ekscitite alpaŝas lin.*)

Turai: Ne, ne! Transe regis silento. Eĉ vorto ne aŭdiĝis. La viro foriris kaj la damo dormis. Mi pro vi ne dormis.

Gál (*komencas manĝi.*)

Turai: Kio? Ĉu nun jam glitas la glutoj?

Gál (*ĉesas*): Ne. Mi ne povas gluti. Mi estas terure nervoza. Mi estas kaputa.

Ádám: Mi, karega Aleksandro... mi ne volas plu esti ŝargō por vi kun mia rompita vivo.

Turai: Nu, nu!

Ádám: Ne. Mi rekonis tion. Kun la sanganta vundo en mia koro, kun mia senesperigo...

Turai: Do, karega filo, da tia voĉo eĉ ĉi malmulte sufiĉis. Vi estas viro. Diru, kion vi volas!

Ádám: Antaŭ ĉio mi forveturos de ĉi tie.

Turai: Tion vi bone faros. Kaj plu?

Ádám: Krome la muzikon, kiun mi komponis por ŝi, mi disŝiros kaj forbruligos.

Turai: Nu, kion kroman vi ankoraŭ faros?

Ádám: Ne traktu min tiel malŝate! Vidu, mi havas neniun krom vi. Ekzistas nur vi ambaŭ. Se vi nun ne estus ĉi tie, mi jam delonge estus fininta mian vivon.

Turai (*al Gál, kiu ree pikfosas en la matenmanĝo*): Kion vi faras de-nove?

Gál: Mi ree provis, sed ne eblas. Mi ne povas gluti. Ĉi tiu afero faris min malsana.

Ádám: Vidu, ankaŭ ties kaŭzo estas mi.

Turai: Nu, kara filo, ni parolu serioze. Kio okazis, tio okazis. Sed vi estas juna. Talenta. La futuro estas la via. Kaj milionoj da aliaj virinoj ekzistas en la mondo.

Ádám: Sed se ĉi tiun mi tiel multege amas!

Turai: Ni forveturos. Ĉu vi jam estis en Parizo?

Ádám: Ne.

Turai: Do ĝi estos la unua stacio. Parizo estas la eterna konsolanto de malfeliĉaj enamiĝintoj. Sed nun temas pri la plej proksima futuro. Pri la hodiaŭa tago kaj pri morgaŭ.

Ádám: For de ĉi tie, tuj for de ĉi tie! Mi ne volas vidi ŝin.

Turai: Tamen vi vidos ŝin. Mi ne toleras, ke ĉi tie okazu skandalo kaj klaĉado. Nokte vi alvenis, ĉiuj scias, ke ŝi estas via fianĉino, kaj ĉu hodiaŭ matene vi volus eskapi? Nenio pli mankas! Ne zorgu, mi ne deziras, eĉ ankaŭ ne permesas, ke vi repaciĝu kun ŝi. Sed vi devas kolekti ĉiun vian forton. Antaŭtagmeze ni bele salutos ŝin, kaj unu-du tagojn ni ankoraŭ restos. Eĉ vorteton ni ne diros pri tio, kio okazis. Vi konduktos kun ŝi afable kaj saĝe, kiom ajn vi sangas ene. Mi scias, ke tio doloras. (*Montras al Gál.*) Li diris nokte, ke vi devas ekkoni la maldolĉaĵojn de la vivo. Do ĉi tiu estas tio. Kaj... La plej maldolĉa amaraĵo. Hodiaŭ vi fariĝis viro, filo.

Ádám: Vi pravas. (*Viŝas siajn larmojn.*)

Turai: Kion vi nun faris per via mano, tio havu simbolan sencon. Kaj tio estu ankaŭ la futuro de via programo. Neniu ploro. Nur forto kaj sinrego. Postmorgaŭ ni forveturos. Kaj kiom ajn tio doloras, filo, kun ĉi tiu virino vi finis por la tuta vivo.

Ádám (*ekreginte sin*): Estos tiel, kiel vi diras. Kaj se eble... mi ne eltenos la doloron... ne zorgu, mi ne petos ŝin, reveni al ŝi. Mi havos ĉiam sufiĉan forton, por pafi kuglon en mian koron.

Gál: Jen, tion vi jam atingis per via psikologio.

Turai (*al Ádám*): Hontu pro tio!

Ádám (*amare*): Ne koleru... vi ja vidas, ke mi regas min... Pardonu min pro ĉi tiuj malsaĝaj vortoj! Vi estos kontentaj pri mi.

Gál: Brave! Do nenion vi disŝiros.

Ádám: Ne.

Turai: Vi kondutos kun Anjo, kvazaŭ estus nenio okazinta.

Ádám: Tiel. Jen mia honorvorto. (*Etendas sian manon.*)

Turai: Mi estas kontenta pri vi.

Gál (*sidante ĉe la matenmanĝo*): Tre trankviligas min, filo, ke vi tiel brave kondutas. (*Manĝas.*) Tre trankviligas min.

Turai: Mi estas ravita. Mi estas fiera pri vi. Mi vidas, vi havas ankoraŭ larmon en la okulo, filo. Forviŝu ĉi tiun lastan! Ĉu?

Ádám: Jes. (*Forturnas sin, forviŝas la larmon.*)

Gál (*dum manĝado*): Venu ĉi tien, filo. Mi jam povas gluti. Venu al mi bele. Nun ankaŭ al vi revenos la apetito. Vi vidos. (*Manĝas. Al Turai, kiu sidas apud li, mallaŭte.*) Li terure suferas. Tiel la afero ne iros.

Turai: Oni devas provi.

Gál: Venu al mi, filo... manĝu ion malpezan... en tiaj okazoj malvarma kokinaĵo estas tre rekomendinda. Rigardu ĉi tiun belan, blankan brustopecon!

Ádám (*sidiĝas ridetante*): Ne parolu pri bela, blanka brusto... tiel estos tre malfacile forgesi.

Gál: Bone. Do rigardu ĉi tiun belan, grandan, dikan piedon! Iom da varmega teo... ĉu kun konjako?

Ádám: Dankon.

Gál (*al Turai, starante for de li, profundiginte en sia pensoj*): Nu kaj vi?

Ádám: Kio? Ĉu nun vi iĝis malĝoja, kiam mi fine estas gaja?

Gál: Ba, ne! Mi vetus, ke li denove...

Turai: Vi gajnis la veton. Denove interesas min alia problemoj...

Gál: Ĉu teatro?

Turai: Ĝuste. Kiel ĉiam.

Gál: Tio estas jam...

Turai: La afero statas tiel, ke hieraŭ, kiam ni alvenis, mi diris: kiel malfacile estas komenci teatraĵon. Kaj nun mi meditas pri tio, kiel malfacile estas fini akton.

Gál: Venu prefere manĝi!

Turai: Ne ŝercu! Tio nun tre ekscitas min. Ni prenu ekzemple deno-

ve nian kazon. Ni nun estas post la katastrofo. Sed dank' al Dio, ni eltenis ĝin, ni rearanĝis nin. Ni decidis, kiel ni agos, nun ni povos iom senpeziĝi. La akto estas propre finita. Do se ĉi tiu ĉambro estus denove scenejo, kaj ĉi tri figuroj rolus en ia peco, kiel vi finus la akton post ĉi tiuj eventoj?

Gál: Nu, ĝi estas ja finita!

Turai: Jes. Sed antaŭ ol la kurteno falos, por la vera fino, io ankoraŭ bezonatus. Tiel nomata aktofino. Interesa, ekscita momento. la pintumo, knalo! Aktofino! Ĝi estu finita, kaj tamen ĝi ne havu finon. La intereso de la publiko estu suspendita en surpriza maniero. Nu, kara kompano, fama kunaŭtoro de tiom da teatraĵoj! Kiel vi finus la... kiel mi diru... la duan akton de nia malĝoja historio?

Gál: Mi diros. Estas tre facile. Venu al mi! Sidiĝu ĉi tie kiel tria! (*Turai sidiĝas ĉe la tablo.*) Do, sinjoroj, mi ŝatas la bonetosajn, agrablajn, leĝere francajn aktofinojn, kiuj havas iom da monduma nuanco. Do la tri amikoj sidiĝas por matenmanĝi. Manĝado sur scenejo estas ĉiam agraba afero. La tempesto pasis, la ĉielo ja ankoraŭ nubas, tamen la sunradioj jam komencas brili en la koroj. Nun ni devus, kiel oni kutimas diri, „lasi postsonori” ĉi tiun etoson. (*Mallonga paŭzo. Tre elegante.*) Je via servo, sinjoroj, jen la matenmanĝo! (*Ĉiu prenas sian manĝilon. Li mallaŭte, preskaŭ flustre daŭrigas.*) Ankoraŭ ĉiu pensas iom pri la travivita doloro. Jen tiel. Kaj nun tre elegante... (*kun sia glaso en la mano*)... sprita aforismo... (*al Ádám*) Juna amiko mia! Vi hodiaŭ fariĝis viro, ĉar virigas nin ĉe la virinoj ne la unua venko sed la unua malvenko! (*Levas sian glason.*) Vivu la malfidela fianĉino, kiu faris viron el la infano! (*Ili intertintigas la glasojn.*) Tiel, kaj nun... (*Ridetante, dolĉete...*) Kurteno!

Samtempe ili demetas la tri glasojn sur la tablon, sen trinki. Gál triumfe ridetas.

Turai (seke): Tre malbona. Vere tre malbona. La momento ne estas sufiĉe interesa. Laŭaspekte ĝi estas ja sufiĉe plaĉa, agraba, eĉ elegante, tamen ne sufiĉe interesa. (*al Ádám*) Kiel vi farus ĝin?

Ádám (amare ridetante): Ĉu mi. Ĉu en mia nuna situacio?

Turai: Jes. Diru! Montru!

Ādām (*nervoze, serioze, preskaŭ minace*): Bone mi montros ĝin al vi. (*Stariĝas.*) Ne, mi ne intertintigas la glasojn kun vi! (*Forĵetas sian glason.*) Por mi ĉi tiu virino estis ne efemera momento en mia vivo. Por mi ĉi tiu virino estis mia unua granda pasio. Mi faros al vi la komplezon regi min, ĝis mi povos. Sed la penso, ke mi donis al ŝi mian vivon, kaj ŝi diris al alia homo amajn vortojn, ke alia homo povis tuŝi ŝian korpon... ke ŝi flirtis kaj interkisis nokte kun alia homo, tio estas por mi tiel terure dolora kaj neeltenebla, ke tio havas nur ununuran solvon... (*enpoŝigas la manon kaj eltiris sian revolveron.*)

Turai (*subite saltas al li*): Ha! Ho! Halt!

Ādām (*luktante kun li*): Ne! Ne! Lasu min!

Gál (*same alkuras ekscite*): Nu! Ĉu eble serioze...

Ādām (*luktante kun ambaŭ, krias dolore*): Lasu min! Lasu min morti! (*Turai forprenas lian revolveron. Li rigardas la armilon. Ādām staras muta, pala, spiteme.*)

Gál (*karesas la harojn de Ādām.*)

Turai (*kun la revolvero en la mano*): Kio estis tio? Kion vi volis?

Ādām (*dolore ridetante*): Nu, scenofinon... mi volis fari. (*Sidiĝas.*) Kaj nun... mi kredas, sufiĉe interesa estas la momento... Do... (*mallaŭte, ridetante*) Kurteno!

Turai: Malbona. Tre malbona. (*Enpoŝigas la revolveron.*) Tre, tre malbona. Unue morto ne estas ĝustaloke fine de la dua akto. Morto havas efikon nur plej fine. Kaj la sceno ne estas interesa sed brutala. La momento estas timiga kaj tamen seninteresa. Necesas streĉo! Interesaĵo bezonatas, antaŭ ol la kurteno subiras.

Gál: Diru do, kiel farus ĝin vi!

Turai: Mi kredas, multe pli bone.

Ādām: Nu, pri tio mi vere scivolas.

Turai: Kiel vi volas. (*Iras al la telefono.*) Ha lo! Mi petas la ĉambron de s-ino Anjo Balogh.

Transe telefona sonorado.

Anjo (*transe*): Ha lo!

Turai: Ha lo, ĉu Anjo?

Anjo: Jes. Kiu parolas?

Turai: Ĉu vi ne rekonas mian voĉon? Parolas Turai.

Anjo: Ĉu Turai? Ĉu Aleksandro Turai?

Turai: Jes. Mi kisas vian manon.

Anjo: Aĥ... Ĉu vi estas ĉi tie? De kie vi parolas?

Turai: Mi estas en la kastelo. En la najbara ĉambro. Apud la via. N-ro kvar. Hodiaŭ nokte ni alvenis per aŭtomobilo. Ni ĉiuj tri estas ĉi tie. Ni alportis la pretan opereton!

Anjo: Sensacie! Jen surprizo!

Turai: Ni ne volis ĝeni vin frumatene. Sed nun mi devas tamen peti vin, bonvolu transveni por momento. (*Remetas la aŭdilon, iras al la pordo. Ádám kaj Gál stariĝas surprizite.*)

Anjo (*feliĉe enkuras tra la interĉambra pordo*): Ho, tio estas sensacia surprizo! Kiel afable deflanke de vi! Alberto! Albeĉjo! (*Intersaluto kun Ádám.*) Koro mia! Mia unusola karega! Ho, tio estas vera surprizo! (*Etendas sian manon por kiso al Gál kaj Turai.*) Turai! Aleksandro! De tri monatoj mi ne vidis vin! Vi estas bronzigita. Plijunigi! Montru vin! Ho... vi havas pompan vizaĝkoloron! Kaj Gál! Bonvenon! Tio estas vere tre afabla deflanke de vi! Ĉi tie ni jam atendas vin tiel senpacience! Kiam vi alvenis?

Turai (*tre serioze*): Pardonon! Sidiĝu, Anjo! (*Enrigardas en la ĉambron de Anjo.*) Aĥ! Kara majstro! S-ro Almády! Bonvolu, bonvolu enveni! Ni havu la feliĉon!

Almády (*enpaŝas, nerveze, suspektante ion malagrablan*): Bonan matenon!

Turai: Ĉu ankaŭ vi estas ĉi tie, denove post tiom da jaroj?

Almády: Mi vojaĝadis ĉi-regione. Aŭtomobiladis, mi volis nur saluti la dommastron, sed perforte oni arestis kaj restigis min. Hodiaŭ estos nome la granda koncerto. Nu, por ke mi entreprenu rolon...

Anjo (*kun trudita bonhumoro sed ektime*): Aĥ, kia surprizo!

Turai: Pardonu, ke mi ĝenis vin, kaj nun eble mi malbonigas ĉi tiun sunluman etoson de la revido, sed mi havas tre gravan direndon.

Anjo: Ĉu? Ĉu io serioza?

Turai: Jes. Eble eĉ pli ol serioza.

Anjo (*ektime sidiĝas.*)

Turai (*al Almády*): Bonvolu sidiĝi!

Almády (*ektime*): Ne, dankon, prefere ne.

Turai: Kiel al vi plaĉas. Ni alvenis ĉi tie hodiaŭ nokte. (*Parolas kun longaj paŭzoj.*) Kaj nun... ni tri... kune ni sidas ĉe la matenmanĝo. (*al Gál*) Ĉu?

Gál (*scivole*): Jes...

Ádám: Nu kaj?

Turai: Nur trankvile, mi petas vin. Ĉi tie ni sidas, ĉu ne, familiece... (*ŝanĝinte tonon, tre serioze*) Pardonu min, sed mi decide petas vin ĉiujn, ke kion mi estas dironta, akceptu trankvile kaj ne perdu vian malvarman sangon.

Anjo (*ektime*): Sed pro Dio...

Ádám (*maltrankvile*): Sed pri kio temas?

Turai: Mi petas vin! (*Faras ordonan geston de silentigo. Morta silento.*) Kion mi ĉi tie fine diros, tio havos verŝajne decidan signifon por la plua vivo de ni kvin. Tamen nun, mi jam estas tute decidiĝinta! (*solene*) Kara Anjo! Mi vin jene... (*Ĉesas. Morta silento. Poste tre simple, al Gál.*) Tio estas interesa momento, ĉu?

Gál (*tre ekscitite*): Jes. Nu?

Turai (*tre simple*): Do... nun subiru la kurteno! (*Ridetante etendas la brakon al Anjo.*) Ni diskutis nome pri scenofinoj... (*Kondukas ŝin malrapide al la enireja pordo, dum la terurita societo senpeziĝas.*) ...kiel oni faru per plej simplaj rimedoj interesan scenofinon... Ĝi estas nome... (*La kurteno subiras, dum interparolante ili eliras.*)

Gál (*kun manoj, levitaj alĉiele*): Tio estas jam manio ĉe li... Teatro!

Almády: Kia cerbo!

Kurteno

TRIA AKTO

La sama ĉambro, samtage, je la oka horo.

La sekretario, plaĉa, vigla junulo reŝovas seĝon. La mebloj nun estas jene disaranĝitaj: maldekstre antaŭe, kontraŭ la publiko staras du foteloj, inter ili tableto, dekstre antaŭe granda kanapo kun seĝo apude. La tablo nun ne estas sur la scenejo. La sekretario ankoraŭ ĵetas lastan rigardon al tia disaranĝo, kiam enpaŝas la lakeo, kiu portas libron, persikon kaj du leterojn sur arĝenta pleto.

La lakeo estas pompe vestita, brilas de oro.

Sekretario: Demetu ĝin ie!

Lakeo: Jes, s-ro sekretario. (*Demetas la pleton.*)

Sekretario: Oni anoncis la provon por la oka horo, kaj ankoraŭ ne-niu estas ĉi tie. Kioma horo estas ĉe vi, kara Devornié?

Lakeo: Precize la oka.

Sekretario: Ĉu oni komencos ĝustatempe la vespermanĝon?

Lakeo: Precize je la naŭa. *A neuf heures, précises.*

Lakeo: *Merci.*

Lakeo: *Pas de quoi, Monsieur le Secrétaire.*

Almády (*enpaŝas en frako.*)

Sekretario: Aĥ, mi havas la feliĉon. Kia akurateco, s-ro aktoro! Precize je la oka.

Almády (*mishumore*): Bonan vesperon!

Sekretario: S-ro aktoro estas la unua en la areno.

Almády: Tuj venos ankaŭ la aliaj. Nun ili finis la transvestiĝon.

Sekretario: La ĉasado estis hodiaŭ mirinda. Bonege ĝi sukcesis! Certe ankaŭ la s-ro aktoro tre ĝuis ĝin.

Almády (*orgojle*): Mi ne ĉasis.

Sekretario: Aĥ! Kie do vi estis?

Almády: En mia ĉambro. Mi skribis.

Sekretario: Ĉu vi permesas al mi demandi, kion vi bonvolis skribi?

Almády: Mi ne permesas al vi demandi. (*Por paroli pri io alia.*) Pleje ni havas unu horon por la provo. Ĉu la koncerto komenciĝos tuj post la vespermanĝo?

Sekretario: Post la kafo.

Almády: Kaj nia programero?

Sekretario: Estos la lasta. *Pièce de résistance*. La ĉefa atrakcio. (*Montras al la foteloj*). Kaj jen ĉi tie estas la scenejo por la provo. La aktorino diris, ke por ĉi tiu peco necesas nenio alia ol du ornamitaj foteloj kaj unu ornamita tableto. (*Rearanĝetas la meblojn.*) La stilo estas de Ludoviko la dek-kvina. Ĉu ĝi konvenas?

Almády: Al mi ajna Ludoviko konvenas.

Sekretario: Permesu al mi demandon, s-ro aktoro! Diru, kial ne ekzistas Ludoviko la dek-sepa? Ni havis unu Ludovikon dek-sesan kaj unu dek-okan. Kial ni ne havis ankaŭ unu dek-sepan?

Almády: Demandu meblokomerciston!

Sekretario: Mi jam demandis. Sed tiuj konas Ludovikojn nur ĝis la dek-sesa. Depost tiu eĉ ombron da konjekto ili ne havas pri la ceteraj. (*Viŝante sian frunton.*) Mi estas tre ekscitita, s-ro aktoro.

Almády: Kial?

Sekretario: Pro la hodiaŭa festa, okaza koncerto, dancado! Min ŝarĝas la tuta respondeco. Ĉiufoje mi aranĝas por la grafa moŝto tiajn vesperojn. Sekretarioj havas tian sorton. Mi funkcias ĉi tie kiel reĝisoro, kulismastro, sufloro, notar-foliumanto, damakompananto, enmaniganto de bukedoj... eĉ mi estas ankaŭ la aplaŭdestro, ĉio mi estas. Mi entuziasmas por la artoj, s-ro aktoro! (*Al la lakeo, kiun li kaptas ĉe rikanado.*) Vi povas foriri, Devornié.

Lakeo: *Oui, Monsieur le Secrétaire.* (*Eliras.*)

Sekretario: La s-ro aktoro ne havas bonan humoron.

Almády: Vi trafis. Mia kapo zumas pro la multa lernado.

Sekretario: Ĉu vi havas bonan rolon?

Almády: Ĉu mia rolo? Abomena!

Sekretario: Ĉu vi opinias? Kial vi do ludas ĝin?

Almády: Trudo.

Sekretario: Ĉu trudo?

Almády: Kolegiemo.

Sekretario: Nu, nia ĉasista societo kompensos la s-ran aktoro per aplaŭdoj. Vi vidos, kiel entuziasman publikon ni havas. Ĉi tie havas

sukcesos eĉ la plej sentalentaj artistoj.

Almády: Dankon!

Sekretario: Pardonon! Ne tiel mi komprenis.

Anjo enpaŝas en balrobo kaj Ádám en frako.

Anjo: Mi vidas, ke ni jam estas kune.

Almády (*senvorte klinas sin.*)

Sekretario (*kuras al Anjo*): Mi kisas vian manon! (*al Ádám*) Sekretario Lehóczki.

Ádám: Ádám.

Anjo (*al la sekretario*): Notu al vi ĉi tiun nomon, li komponas la muzikon por nia nova opereto.

Sekretario: Aĥ, majstro!

Ádám: Nu, tio mi ankoraŭ ne estas!

Anjo: Ĉu do ni komencu la provon?

Almády: Propre ni devus atendi s-ron Turai. Li ja estis tre kompleza kaj promesis helpi al ni.

Anjo: Tuj li estos ĉi tie. Kie estas la sufloro?

Sekretario: Jen mi estas.

Anjo: Jen la teatraĵo. (*Transdonas al li la manuskriptojn.*)

Sekretario (*fiere*): Ĉu mi bone aranĝis la provoscenejon?

Anjo: Rave. (*al Ádám*) Nun vi estas ree mishumora.

Ádám: Tute ne temas pri tio. Pardonu min, sed kiel mi jam diris, ĉi tiu aŭtomobilado terure lacigis min. Ĝi ne estas leĝera promenado: unuventure veni el Vieno ĝis la Mediteranea Maro. Nokte mi ne povis dormi... pro elĉerpiĝo. Mi estas laca, jen la tuta klarigo. KREDU min! (*La sekretario nervozas.*) Nu, ni komencu, vidu, la s-ro sekretario estas jam senpacienca.

Anjo: (*al la sekretario*): Nu, kio?

Sekretario: Mi estas tre ekscitita, aktorina moŝto.

Anjo: Ĉu vi? Kial?

Sekretario: Ĉar mi estas sekretario.

Anjo: Restu nur trankvila, mi petas vin. Ankaŭ sen tio nia afero estas tiel malfacila. Kaj mi estas tre nervoza. (*Al Ádám, kiu sidiĝis.*) Kio?

Ĉu vi volas ĉeesti la provon?

Ādām: Jes.

Anjo (*en granda embaraso*): Ba, sinjoro... ĝi tedos vin. Stulta franca teatraĵeto. Sufiĉas, se post vespermanĝo vi spektos ĝin.

Ādām: Mi devis promesi al Turai, ke mi restos ĉi tie kaj helpos al vi, ĝis li venos. Mi ĉiufoje ĝislaste tenas min al tio, kion mi promesas al ili.

Anjo: Bone. Kiel vi volas. (*tre nervoze*) Do ni komencu, mi petas vin. Kie estas la rekvizitoj?

Sekretario: Ĉiuj kunestas. (*Montras al la pleto.*) Kie mi estas la rekvizitisto! Unu libro, du leteroj kaj unu persiko.

Anjo (*prenas la libron kaj unu leteron*): La cetero estas la via, Almády.

Almády (*enpoŝigas la persikon kaj la alian leteron.*)

Anjo: Kaj nun ek, ni komenci la ĉefprovon. La grafino... estas mi... Sola ŝi estas sur la scenejo. Mi sidas en fotelo kaj legas romanon. (*Sidiĝas.*) Vi ne estas ene, Almády, nur pli malfrue vi envenos.

Almády (*iras fonen, kaŝas sin ie.*)

Sekretario: Ĉu ni povas komenci?

Anjo: Ne demandu tiel multe! Ni povas komenci!

Sekretario (*flustras al ŝi*): „Plaĉe meblita salono.”

Anjo: Kio?

Sekretario (*flustre*): „Plaĉe meblita salono en stilo de Ludoviko la dek-sesa.”

Anjo: Vi malfeliĉa! Tion vi ja ne bezonas suflori!

Sekretario: Ĉu? Ĝis nun mi ĉiufoje sufloris ankaŭ ion tian.

Anjo: Tion oni devas flustri al la remburisto antaŭ la prezentado. Al la aktoroj nur tion, kion ili diras.

Sekretario: Ĉu? Nu, tio estas interesa. (*Stulte gapas en la broŝuron.*)

Almády (*antaŭenvenas*): Kio okazis?

Anjo: La s-ro sekretario ne kapablas suflori.

Ādām (*forprenas de li la broŝuron*): Donu ĝin al mi! Mi sufloros. Bonvolu komenci!

Anjo kaj Almády (*samtempe*): Ne! Ne!

Anjo: Vi ne sufloru!

Ádám: Kial?

Anjo: Ĉar mi ne volas.

Ádám: Kial vi ne volas?

Sekretario (*ofendite, ironie*): Ŝajnas, ke tio estas humiliga okupo. Bonvolu redoni ĝin al mi!

Ádám: Ne, sinjoro, vi nervozigas ilin.

Sekretario: Ĉu mi nervozigas ilin? Ili nervozigas min.

Ádám: Nu, bonvolu trankviliĝi. En la provo sufloros mi, vi atentu, kiel oni devas fari tion, poste vespere ĉe la prezentado sufloros vi. Ĉu bone?

Sekretario (*profunde ofendite*): Bonvolu!

Anjo (*al la sekretario*): Ĉu nun vi ofendiĝas?

Sekretario: Mi ĉiufoje, sinjorino. Sed poste mi tuj repaciĝas. Mi estas sekretario.

Anjo: Tiam ni komencu. (*al Almády*) Bonvolu eliri. La grafino sidas en la fotelo kaj legas. (*Prenas la libron.*)

Silento. Almády kaŝas sin.

Ádám (*flustre*): „Aĥ, kiel dolĉeca...”

Anjo (*diras sian rolon*): Aĥ, kiel dolĉeca estas ĉi tiu romano. (*Fermas la libron.*) Ĉiu romano estas samforma. La edzo amas sian edzinon. La edzino amas iun alian. La edzo sciĝas kaj faras skandalon. Aŭ li forpelas sian edzinon, aŭ pardonas al ŝi.

Ádám (*flustras*): „Aĥ, sed kion mi faru...”

Anjo: Aĥ, sed kion mi faru? Mia edzo, la grafo elrajdis, kaj por mi, restinta sola, ĉi tiuj posttagmezoj estas tiel longaj. Se ili ne estus, la vivo estus tolerebla en ĉi tiu pramalnova kastelo. Ĉi tie, tiel malproksime de Parizo, meze de la normandiaj arbaroj kaj kampoj.

Ádám (*flustras*): Paŝoj...

Almády paŝfrapas per la piedoj.

Anjo: Aĥ, mi aŭdas paŝojn! Ĉu jam mia edzo? Li ja seligis kaj diris, ke li vizitos Benoit, nian fidelan, maljunan farmanton.

Almády (*venas antaŭen, sinistre*): Sinjorino!

Ádám (*flustre*): „Nu, kio okazis, kial vi estas tiel ekscitita...”

Anjo: Nu, kio okazis, kial vi estas tiel ekscitita, grafo?

Almády: Kial mi estas tiel ekscitita? Tuj vi ekscios, grafino, la afero estas tiel vera kiel mia nomo...

Ádám (flustras): „Maurice du Veyrier...”

Almády: ... kiel mia nomo estas grafo Maurice du Veyrier de la Grande Contumace Saint Emilion, vi tuj ekscios la kaŭzon de mia ekscitiĝo.

Anjo: Vi timigas min, Maurice!

Almády: Vin timigas via propra kulposento, sinjorino!

Ádám (flustre): „Vi trompas min, sinjorino!”

Almády (tre nervoze): Vi trompas min, sinjorino! (*al la nervoziĝinta Anjo*) Kio okazis? Kio trafis vin?

Anjo: Nenio. Mi estas iom nervoza. Ni daŭrigu.

Almády: Vi trompas min, sinjorino! Jam delonge mi flegas la suspekton. Sed nun finfine mi havas la pruvon en la mano! Jes, jes! Kompreneble, vi kredas pri mi, ke mi... mi...

Ádám (flustras): „... estas facilkreda, estas facile trompi min...”

Turai és Gál en frako enpaŝas.

Ádám (al Almády): Nu, kial vi ne diras? (*Sufloras pli laŭte, dume vekante la impreson, kvazaŭ li reale parolus al Almády.*) „... mi estas facilkreda, estas facile trompi min, al mi oni povas ĉion kredigi!”

Turai (terurite proksimiĝas al li): Kio okazis?

Ádám: Silenton! (*ree suflorante*) „Mi estas facilkreda, estas facile trompi min...”

Turai (senpeziĝas): Aĥ tiel! (*Forprenas de li la broŝuron.*) Donu ĝin al mi!

Ádám: Kial? (*al Anjo*) Ĉu mi ne bone sufloras?

Anjo kaj Almády (samtempe): Ne!

Ádám: Nu, tio estas absurda!

Sekretario: Ankaŭ pri mi ili ne estis kontentaj.

Ádám: Sed kio do ne estis bona?

Turai: Ne demandu tiel multe! (*Sidiĝas surloke de Ádám. Transprenas la laboron.*)

Anjo (*tre nervoze*): Tio okazas, ĉar vi ne estas akurata. Tial okazis ĉio.

Ádám: Sed kio okazas ĉi tie? Pro kio estas tiel granda ekscitiĝo? Okazis ja nenio.

Turai: Lasu, filo, vi ne komprenas pri tio. Aktoroj estas nervozaj, kiam ili provas. Por vi ĉi tiu teksto estas nova, sed ili diras ĝin jam, Dio scias, kiomfoje.

Ádám (*sidiĝas flanke.*)

Sekretario (*al Ádám*): Ili ofendas ĉiujn.

Turai (*rigardas en la broŝuron*): Do, ek, rediru la lastan frazon!

Almády (*tre flue*): Vi trompas min, sinjorino! Jam delonge mi flegas la suspekton. Sed nun finfine mi havas la pruvon en la mano! Jes, jes! Kompreneble, vi kredas pri mi, ke mi estas facilkreda, estas facile trompi min, al mi oni povas ĉion kredigi! Ne, sinjorino! Nun unufoje vi miskalkulis.

Turai: Sed tio ja iras perfekte.

Anjo: Ĉar ni havas bonegan sufloriston.

Ádám: Sed li ja eĉ vorton ne flustras.

Anjo: Ĝuste tio estas bonega ĉe li.

Sekretario: Lasu, majstro, ni neniam ellernos tion.

Ádám: Ŝajnas, ke ne.

Turai: Plu!

Almády: Ankaŭ ĝis nun kun suspekto mi vidis viajn ripetajn promenrajdadojn kun la najbara bienulo, markizo François Gilette de la Tour d'Auvergne, kun kiu vi ĉiutage plurajn horojn trotras de Duvernois Sur Saône sur la vojo al Saint Sulpice de la Grande Parmentière.

Anjo: Ho, tio estas fia suspekto!

Almády: Permesu kelkajn vortojn al mi, sinjorino! En mia poŝo kaŝiĝas la pruvo! Sendanka infano! Kiu vi estis, kiam mi edzinigis vin? Via patro, brigada generalo Pierre-Jean Bourmond de la Seconde-Chaumière-Rombouillet falis apud Grande Lagruière Sur Marne, kaj vi, kiel kudristinetto, vivis en mizero kun via patrino en la vilaĝeto Sainte Geneviève, en la departemento Seine et Oise. Mi donis al vi, sinjorino, nomon, rangon kaj havaĵon, mi faris vin grafino de Du Veyrier de la

Grande Contumace Saint Emilion, mi transskribigis al vi ne nur mian bienon Pardubien Grand-Amanoir, sed ankoraŭ du miajn kastelojn en Challanges-Débicourt de la Romanée kaj Rivalieux-Quandamouzières Sur Ventera aux Alps Maritimes. (*Li ĉesas, nervoze.*)

Turai: Nu, kio okazis?

Almády: Estas terure diri tiel multajn francajn nomojn.

Turai (*levas la ŝultrojn*): Kion mi faru?

Almády: Ĉu necesas tiom?

Turai (*montras al la kajero*): Enestas.

Almády: Sed mi freneziĝos, ĝis mi enbatos en la kapon ĉi tiujn plur-kilometrajn nobelajn kaj topografiajn nomojn. Kaj ili ĉiuj estas en mia rolo!

Turai (*trankvile*): Ĝuste tial bonvolu ellerni ilin.

Almády (*sufokiĝe pro kolero*): Terure! Almenaŭ ĉi tiun duan kastelon ni ellasu.

Turai (*malvarme kiel ekzekutisto*): Ne eblas. Se ĉi tiu grafo donacas nur unu kastelon al sia edzino, ne estas tiel indignige, ke la virino trompas lin. Se oni havas nur unu kastelon, io tia ankoraŭ preterglitas. Ankaŭ ĉe tri kasteloj ŝi povas trompi lin, sed tiom nur dupo donacas al virino. Ĝuste inter la du estas la preciza mezuro. Ĝi estas la meza vojo. Tion ni nomas saĝa franca dramaturgio. Ni iru plu!

Almády (*suspirante*): Mi faris vin grafino kaj riĉa. Kaj la dankemo? Vi trompas min, jes ja, vi kokras min kun mia najbaro, markizo Jean François Gilette de la Tour d'Auvergne, sinjoro de Périgord des Champignons kaj Saint Sulpice de la Grande Parmentière. Pestu trafu ilin! (*al la miranta Turai*) Ĉi tiujn longajn nomojn. Pardonon!

Turai: Sed komprenu, sinjoro, ĉi tiuj estas francoj, kion vi deziras, kiel oni nomu ilin?

Almády: Kiel? Ekzemple Briand. Briand! Ankaŭ tiu estas franco.

Anjo (*nervoze*): Ni progresu. Estis sufiĉe, grafo! Mi ne toleras plu ĉi tiun humiligan, akuzan parolon! Vi kalumnias tiun virinon, kiu portas vian nomon.

Almády (*al Turai*): Tio ne estas juste, sinjoro!

Turai: Kio?

Almády: Mi devas ĉiufoje elparoli la tutan nomon, kaj ŝi diras nur „vian nomon”.

Turai (froste): Plu!

Almády: Ankoraŭ unu vorton, sinjorino, kaj elpoŝigos la pruvo!

Anjo (ridante teatrece): Ha-ha-ha! Ĉu pruvo? Mi devas ridi!

Almády: Mi frostigos ĉi tiun ridon sur viaj lipoj! (*Elpoŝigas la persikon.*) Jen la pruvo!

Anjo (kun tragika ŝriko): Aĥ! La persiko!

Almády (metas la persikon sur la tablon): Jes, sinjorino, la persiko! La unua persiko, kiu kreskis kiel unua sur la ĵaluze gardata, frumaturiĝanta, nana orient-hindia persikarbo en mia fruktoĝardeno de Simarineux, kaj per tio ĝi plifruis ĉiujn persikojn de tuta Francio! Vi scias, ke mi estas pasia fruktoĝardenisto, vi scias, ke mi flegas, prizorgas ĉi tiun persikon jam de ĝia floraĝo, gvidas taglibron pri ĝi, kaj atendas ĝin kiel Mesion! Kaj kio okazis? Hodiaŭ posttagmeze mi elajdis kaj dum mi trankvile trotras same de Duvernois Sur Saône... (*Rigardas al Turai.*)

Turai (froste): ...sur la vojo...

Almády (kolere): ...sur la vojo al Saint Sulpice de la Grande Parmen-tière, kiun mi vidas marŝi tie? Juliette, vian ĉambristinon. Mi alparolas ŝin, ŝi embarasite balbutas. Mi demandas, kien ŝi iras. Ŝi ektimas, ekploras kaj respondas: „Mia sinjorino sendis min al markizo François Gilette de la Tour d'Auvergne.” Diablo prenu lin! (*Rigardas al Turai.*)

Turai: Bone, bone. Tio nun enestas.

Almády: Diablo prenu lin, mi diras, kial sendis vin via sinjorino al la markizo? Pli atente mi alrigardas, kaj vidas, ke ŝi kaŝas paketon en la mano. Mi forprenas ĝin, malvolvas, jen (*Montras al la persiko.*) tio enestis! La reĝo de persikoj, unuaaĵo de fruaĵoj, mia fieraĵo, la unua purspecia persiko de Simarineux, kiun mi tiel flegis kvazaŭ mian infanon. Kaj tio estas ankoraŭ ne ĉio, sinjorino! Jen, apud la frukto kuŝis ĉi tiu letero! (*Elpoŝigas la leteron kaj laŭtlegas ĝin.*) „Karulĉjo! Ĉi tiu estas la unua persiko, kiu maturiĝis ĉi-jare en Francio. Mi sendas ĝin al vi, manĝu ĝin kun devoto!” (*Tenas la leteron sub ŝian nazon.*) Jen!

Anjo: Kion mi faru al ĝi? Ĉu mi flaru ĝin?

Almády: Jes. Ĉar se vi neus vian skribaĵon, vian parfumon vi ne po-

vas nei, sinjorino! Aŭ ĉu vi neas ĝin?

Anjo: Ne.

Almády: Aĥ! Do vi konfesas!

Anjo: Jes.

Almády: Ĉu vi sendis al li ĉi tiun persikon?

Anjo: Mi.

Almády (*al Turai*): Tio estas maljusta, sinjoro. Mi havas plurmetrajn frazojn, kaj ŝia rolo estas nuraj mallongaj vortoj: „Ne. Jes. Mi”!

Turai: Ĝuste. Sardou kutimas karakterizi per ĉi tiu mallonga parolmaniero siajn famajn virinfigurojn en siaj pecoj. Ni iru plu!

Almády (*daŭrigas sian rolon*): Do vi akceptas mian amon, mian nomon, mian rangon, mian bienon, miajn du kastelojn, kaj malgraŭ tio vi ne hontas sendi mian plej karan frukton al via amato!

Anjo (*kun teatreca ŝriko*): Aĥ! Tion mi ne toleras! Revoku ĉi tiun vorton!

Almády: Ĉu eble la markizo ne estas via amato?

Anjo: Ne!

Almády (*teatrece, amare ekridegas*): Ha-ha-ha! Sinjorino, mi estas ĝardenisto, la unua amatora ĝardenisto de Francio, prezidanto de la pariza fruktoklubo. Mi scias, ke oni sendas tian valoregan raraĵon nur al tiu, kiun oni amas. Mi disdegnas vin, sinjorino.

Anjo: Ĉu vi konsideras disdegninda, kion mi faris?

Almády: Ĝuste.

Anjo: Dankon. Nun ankoraŭ respondu mian unusolan demandon: Al kiu vi sendis ĉi-jare fruprintempe la alian fieraĵon de la ĝardeno de Simarineux, la unuan korbon da frumaturaj ĉerizoj?

Almády (*konfuzite*): Al mia patrino. Al la patringrafino.

Anjo: Ĉu al la patringrafino? Nu do, ankaŭ mi montros ion al vi. Se vi havas interesan leteron, ankaŭ mi havas unu. (*Prenas el sia brusto leteron, tenas ĝin sub lian nazon.*) Flaru ĝin! Ĉu vi konas ankaŭ ĉi tiun parfumon?

Sekretario: Ĝi komencas iĝi terure interesa! Vera Sardou!

Anjo: Ek, legu ĝin! Mi esperas, vi konas la skribon.

Almády (*kun la letero en la mano*): Mi konas ĝin.

Anjo: Ĉi tiu parfumo kaj ĉi tiu skribo apartenas al f-ino Emilienne, primadono de Folies Bergères, kiun vi distingas per via amikeco kaj protektado.

Almády: Kiel venis al vi ĉi tiu letero?

Anjo: Tio ne tuŝas vin. Letero estas kiel elpafita sago: ne scieblas, kie ĝi haltas.

Sekretario (al Ádám, *aplaŭdante*): Aforismo! Spritaĵo!

Anjo: Nur legu ĝin!

Almády (*laŭtlegas*): „Dolĉe kara hundeto! Hodiaŭ matene mia kaduka, maljuna grafo...”

Anjo: Ek, legu plu! Tiel skribas pri vi via adoratino! Legu ĝin!

Almády: „...maljuna grafo sendis al mi korbbon da ĉerizoj. Li diras, ke ili estas la plej fruaj ĉerizoj de Francio, kiujn li sendas al mi signe de sia amo. Hundeĉjo, Aleĉjo, venu supren al mi hodiaŭ vespere, ni manĝu kune la ĉerizojn de la maljuna stultulo. Ekscitite atendas vin via senpacienca Emilienne.”

Anjo: Nu, vidu! Se vi tiel, do ankaŭ mi tiel. Okulon por okulo. Denton por dento. Fruaĵon por fruaĵo. Persikon por ĉerizoj. Mi vidas, vi ne neas. La ĉerizojn vi sendis ne al la patringrafino, sed al f-ino Emilienne. Ĉu tiel?

Almády (*rompita*): Ĝuste.

Anjo: Nun forlasu mian apartamenton! Aĥ, kia infamio! Vi ne plu vidos min. Ankoraŭ hodiaŭ vespere mi pakos kaj forveturos al mia patrino. Al la patrinkudristino. Kaj se vi eble volus scii, la markizo, pro kiu vi akuzas min, jam delonge ne loĝas ĉi tie. Li vivas en Parizo. Se vi ne domaĝas la penon kaj plu konfesigos mian ĉambristinon, vi povos ekscii ankaŭ, ke ŝi estis konfidita de mi tiel longe pasumi sur la landvojo, ĝis vi preterrajdos, kaj se vi alparolos ŝin, ŝajnigante balbutadon transdoni al vi la persikon kaj la leteron. (*Teatrece ridegas.*) Ha-ha-ha!

Almády: Do ĉu tio estis nur leciono?

Anjo: Tion vi devus diveni, kiam mia ĉambristino malkaŝis min. Se mi vere kokrus vin, mia ĉambristino prefere lasus sin kvaronumi ol igi sin paroli. Bonaj ĉambristinoj estas kiel fiŝoj: en ju pli da partojn oni distranĉas ilin, des pli profunde ili silentas.

Sekretario (*ravite, flustre al Gál*): Aforismo!

Gál: Kaj kia!

Almády: Mi konfesas, mi perdis la ludon.

Anjo: Inter ni ĉio estas finita!

Almády: Yvonne! (*Genuiĝas.*) Nur tion ne diru, ke inter ni ĉio estas finita! Yvonne! Pardonu al mi ĉi unusolan mispaŝon mian!

Anjo: Ne humiligu vin! Grafo, kiu portas tian nomon! Levu vin! Ne-juna homo! (*Almády stariĝas.*) Mi konfesas, nun mi estas emociita. Sed ne la genufalo tuŝis min, se via saĝeco, ke vi nenion neis. Viro, kiu mensogas, estas kiel leono, kiu kvivitas.

La sekretario turnas sin al Ádám, faras nekontentan mienon kaj skuas la kapon, kvazaŭ li dirus: „Ĉi tiu spritaĵo estas tre stulta.” Ádám jese gestas.

Anjo: Mi pardonas al vi. Sed mi frapos vin per du punoj. Unue mi malpermesas al vi, ke vi manĝu ĉi tiun persikon.

Almády: Aĥ, tio doloras. Sed mi toleras.

Anjo: Due: morgaŭ mi veturos al Parizo. Sola. Por amuziĝi. Ĉu vi komprenas? Sola!

Almády: (*malespere*): Yvonne!

Anjo: Eĉ vorton ne, grafo! Aŭ vi fidas mian honestecon aŭ ne. Se jes, mi revenos, se ne, por eterne mi foriros.

Sekretario (*flustre al Ádám*): Nun mi ne scias, sinjoro, ĉu tio estis spritaĵo aŭ ne.

Ádám: Ne.

Sekretario: Dankon!

Anjo: Mi veturos al Parizo, kaj vi sopiros al mi.

Almády: Aĥ! Kaj ĝis kiam vi volas resti en Parizo?

Anjo: Unu semajnon!

Mallonga paŭzo.

Almády (*ekmuĝe*): Ne, ne! Mi ne eltenos tion! Mi amas vin, adoras vin, frenezigos pro vi! Mi amas vin kiel nuboskrapulo la nubon, kiu ŝvebas super ĝi, sed kun la unua vento forflugas! Mi ne povas vivi sen vi! Nek semajnon! Nek tagon! Nek horon!

Anjo: Vi estas trompulo! Ĉi tiuj estas malplenaj vortoj.

Gál kaj Ádám jam ĉe la vorto nuboskrapulo malrapide kaj tre mirante interrigardas.

Gál: Mi petas pardonon, sed... pardonon, por momento! Kio estis tio?

Anjo: Pardonon?

Turai: Mi petas vin, ne ĝenu! Ĝuste nun, kiam ili prenis elanon!

Sekretario: Bonege! Kaj kiel interese! (*al Ádám, ekscitite*) Kiel vi opinias, ĉu ŝi forveturos?

Gál (*al Ádám*): He vi... tio estas infera.

Turai: Mi petas silenton! (*al Almády*) Bonvolu daŭrigi, eble ni reiru al „Mi amas vin kiel”.

Almády: Mi amas vin kiel nuboskrapulo la nubon, kiu ŝvebas super ĝi, sed kun la unua vento forflugas! Mi ne povas vivi sen vi! Nek semajnon! Nek tagon! Nek horon!

Anjo: Vi estas trompulo! Ĉi tiuj estas malplenaj vortoj.

Almády: Ne! Ne! Mi frenezas por vi! Sed vi misuzis min kaj elpremis min kiel citronon kaj nun vi volas forĵeti min! (*Forturnas sin, kovras sian vizaĝon.*)

Gál kaj Ádám ree interrigardas ĉe la vorto „citrono”.

Nun Gál stariĝas, tre nerveze.

Gál (*al Turai, tre mallaŭte sed tre ekscitite*): Mi petas vin...

Turai (*ŝajnigante senpaciencon*): Kio okazis?

Gál: Mi petas vin por momento. (*al Anjo kaj Almády*) Pardonon, por momento, mi devas nepre diri ion al li. (*al Turai*) He, ĉu vi aŭdas, kion ili ludas?

Turai: Ja kompreneble.

Gál (*tremante pro ekscito*): Do... ĉu vi ne memoras ĉi tiujn frazojn?

Turai: Estas interese. Nun, ke vi diras... efektive... ankaŭ mi rimarkis ion, nur ne volis eldiri.

Gál (*al Ádám, ekscitite*): Venu ĉi tien! (*al Turai*) He, ĉi tiu teksto estas laŭvorte la sama, kiun ni nokte aŭdis tra la muro.

Turai (*rigardas en la broŝuron*): Fakte. He vi... tio estas nekredebla!

Gál (*ekscitite*): Iru, daŭrigu ĝin... ĉar oni rimarkos ion. Ni aŭdu ĝin plu!

Turai *reiras, Gál prenas la brakon de la same tre ekscitita Ádám, kaj ili streĉe atentas.*

Turai: Do ni iru plu, mi petas vin! Kie ni ĉesis? „... nun vi volas forĵeti min.”

Anjo: Kiu volas forĵeti vin, vi malsaĝa! Ne frenezu! Pli frue vi jam re prudentiĝis. Venu ĉi tien, mi kisos vian belan, klasikan kapon.

Gál (*eligas laŭtan ekkriion*): Aaaa!

Anjo (*ekscitite*): Kio trafis lin?

Gál: Mi pardonojn! Mi petas pardonon! (*Apenaŭ scipovas paroli pro la eksciteco.*) Kara Anjo! Kaj profunde estimata s-ro aktoro! Pardonu min, sed refoje mi devas ĝeni vin, sed nepre mi devas diri ion al Turai. (*al Ádám*) Venu kun mi! (*al Turai, kiu alpaŝis.*) He! Ĉi-loke mi fariĝu kolono el salo¹, se ĉi tiuj ne ripetas laŭvorte la saman tekston, kiun ili nokte diris. Ĉi tiuj du hieraŭ nokte... lernis ĉi tiujn rolojn. Kaj ni estas azenoj.

Turai: Bone, bone, ni estas azenoj, sed nun, bonvolu ne faru scenon! (*Ŝajnigas ekscitiĝi.*) Grandega surprizo!... Kiel stranga hazardo!

Ádám (*al Gál*): Prenu ekzemplon de mi! Mi ŝatus bleki pro la feliĉo, kaj vidu, mi retenas min.

Turai: Eĉ vorton ne!

Anjo: Sed Aleksandro, kion vi faras tie?

Almády: Kio okazis, sinjoroj?

Turai (*reveninte al Almády*): Gál diras, kaj mi sentas, ke li pravas, ke por la vespera prezentado farigu al vi ian belan, klasikan kapon.

Almády: Kion signifas, ke mi farigu al mi klasikan kapon?

Turai: La virino diras: „Vian belan klasikan kapon”.

Almády: Jes.

Turai: Do faru ian kapon, pri kiu rajte oni povas diri tion.

Almády: Kial, ĉu pri la mia ne eblas?

Gál (*sincere*): Ne.

¹ Vortoj el la Biblio (Genezo 19:26).

Turai: Li pravas. Via cerbujo estas ĉio, nur ne bela kaj ne klasika.

Almády (*kolere*): Kvankam oni jam diris tion pri ĝi.

Turai: En ĉi tiu peco. Sed pardonu min, virino kun delikata gusto ne povas diri ion tian pri ĉi tiu kapo.

Almády (*kolere al Anjo*): Ĉu ankaŭ vi havas tiun opinion?

Anjo: Min bonvolu lasi, mi tenas min al mia rolo.

Almády (*kun amara rideto*): Bone. Mi do farigos al mi belan, klasikan kapon. (*Ŝaŭmas de kolero.*)

Ádám (*senpacience*): Sinjoroj, la tempo pasas! Ek, ni rekomencu! Rapide! Ni daŭrigu!

Turai: La estimataj sinjoroj spektantoj bonvolu resti trankvilaj. Kial vi estas tiel senpacienca?

Ádám (*konfuzite*): Je la naŭa horo estos la vespermanĝo... kaj (*al la sekretario*), ĉu ne?

Sekretario: Jes. Ni havas nur kelkajn minutojn.

Turai: Do ni faru rapide!

Anjo: Tio estas: Venu ĉi tien, mi kisas vian belan, klasikan kapon. (*Spiras kison sur lian frunton.*)

Almády: Tio ne estas kiso, tio estas trinkmono!

Gál (*transdiras al Turai*): Ĉi tiu komparo estas vulgaraĉa. Ĝi mirigas min... de franca aŭtoro!

Turai: Sed li volis karakterizi per ĝi vulgaraĉan homon.

Gál: Pardonu min, li estas grafo.

Turai: Sed vulgaraĉa, stulta homo, en kies vorttrezoro ne troviĝas pli delikata komparo. Vi ne instruu Sardou verki teatraĵon!

Almády (*kolere*): Sinjoroj, ni daŭrigu! Tio ne estas kiso, tio estas trinkmono!

Anjo: Ne bleku!

Almády: Sed mi blekas! Mi estas elpremita citrono! Mi estas citrono! Eksciu la tuta mondo, ke mi estas elpremita citrono! (*Falas al ŝiaj piedoj kaj skuploras.*)

Gál: Ankaŭ ĉi tiu citrono. Evidenta stultaĵo.

Gál interflustras kun Ádám, tiu feliĉe ridetas, poste ili forte skuas la manon de la alia.

Turai: Sed sinjoroj, kion vi faras tie?

Gál: Nenion. Mi flustris al li, ke mi opinias ĉi tiun citronkomparon stulta.

Turai: Mi opinias ĝin tre bona. Stulta fruktisto, kiu prenas siajn komparojn de tie, kie lia vivo pasas: el inter siaj fruktoj. Ne instruu Sardou verki teatraĵon!

Almády (kiu genuas antaŭ Anjo, reage al ĉi tiuj riproĉoj eklevas la kapon el la sino de Anjo kaj montras koleran mienon.)

Turai: Ni daŭrigu! „Mi petegas vin, ne genuu!”

Anjo (repremas la kapon de Almády en sian sinon): Mi petegas vin, ne genuu, ne ploru, ĉar tion mi ne eltenas. Vi scias bone, mi amas nur vin. (Iras al la tablo, kie estas la persiko.)

Almády (preskaŭ plorante pro la kolero): Ho, ekflamanta memoro de niaj multaj amaj noktoj! (Leviĝas. Paŝas al la tablo kaj volas tuŝi la persikon.)

Anjo: Foriru!

Almády (rigardante la persikon): Ho, kiam mi vidas ĝin! (Tre sensame.) Ho, ĉi tiuj formoj! Ĉi tiu dia rozkolora haŭto! Ĉu ekzistas komparebla en la mondo? (Tuŝas la persikon.) Ho, karesi ĝin!

Anjo: Ĉu vi ne volas malaperigi vin?

Almády (kaptas la persikon, tenas ĝin en unu mano, per la alia sensame karesas ĝin.) Ho! Kiel rondeta! Kiel glata! Velura! Bonodora! (Levas ĝin al sia buŝo.)

Anjo (ekŝrikas): Ne! Ne mordu ĝin! (Elkaptas la persikon el lia mano kaj remetas ĝin sur la tablon.)

Gál komike eligas krion kaj komencas spasme ridi. Ádám etendas siajn manojn al Gál, kaj same elkore ridas. Ili interbrakumas kaj interkisas. Gál ne povas ĉesi ridi. Almády kaj Anjo fortunigas sin de ili, Almády kolere, Anjo hontante.

Sekretario (ekscitite): Kio okazas, sinjoroj, se estas permesite demandi? Ankaŭ mi volus ridi kun la sinjoroj.

Ádám: Tion vi ne komprenas.

Gál (al Ádám, montrante al Turai): Plej bone estas, ke li koleras.

Anjo: Sed pri kio vi ridas?

Turai (*energie*): Sufiĉas, ni daŭrigu!

Gál: Bone. Ni daŭrigu! Ni aŭdu! (*ironie*) Rondeta, glata, velura, bonodora!

Ádám: Kaj ne mordu ĝin!

Anjo (*konfuzite, dirante sian rolon*): Ne, ne mordu ĝin!

Almády (*kolere*): Sed se tiel dezirinda...

Gál kaj Ádám mallaŭte plu ridas.

Almády: Bone, bone, mi scias, ke mi signifas nenion por vi.

Anjo: Kiel vi povas diri ion tian? Ne afliktiĝu tiom! Mi ĵuras al vi per ĉio, kio estas sankta por mi, ke... (*Ĉesas.*) Kio nun sekvas?

Turai: Ĉu vi ne rememoras? Per kio vi ĵuris per ĉio sankta por vi?

Anjo: Mi forgesis. Rolo!

Almády (*amare*): Rolo.

Anjo (*nervoze*): Jes ja, rolo!

Turai (*sufloras*): „...en mia vivo...”

Anjo (*vortgalope*): Ho jes... neniam signifis tiel multe kiel vi. Tion mi ne forgesos nek malkonfesos. Ĉar vi estas viro, de la plandoj ĝis la ver-
to, kiu scias tion, se ne mi!

Turai: Nu, ĉi tiun frazon ni forstrekos.

Anjo: Kial?

Turai: Honesta virino ne diras ion tian. Tio estas tiel klara kaj brutala aludo al seksa interrilato... tion oni ne povas reciti antaŭ tiel eminenta publiko.

Anjo (*hontante*): Sed ĉi tiu virino diras tion en la teatraĵo. Inter kvar okuloj.

Turai (*al la sekretario*): Ĉu partoprenos junaj knabinoj la koncerton?

Sekretario: Jes ja, kompreneble.

Turai (*forstrekas la frazon*): Tiam ni forstrekos ĝin. Anstataŭe ŝi diros: „Kial nei, mi amas vin, kvankam vi aspektas ĉio, nur ne viro.” (*Almády faras geston.*) Plu! (*al Almády*) Mi suferas tiom kiel malsana ĉevalo! (*al Turai*) Vidu, tion oni devus forstreki.

Turai: Kial?

Almády: Kiel oni povas diri ion tian pri si mem?

Turai: Tio jam okazis. Apartenas al la vorttrezoro de bredisto.

Almády: Pardonon. Fruktisto. Lia profesio estas: fruktoj.

Turai: Kaj bestoj. Ankaŭ bestoj.

Anjo: Aĥ, Maurice, ne suferu! Ne staru tie tiel senesperigita. Venu al mi, kisu min, vi azeno!

Almády (*al Turai, raŭke*): Pardonu min... sed ĉevalo kaj azeno! (*Kisas Anjon.*)

Ádám (*al Gál, flustre*): Ĉe ĉi tiu frazo mi eliris el la ĉambro. Kiel komike!

Turai (*nervoze*): Kio? Ĉu ĝi ne plaĉas al vi?

Gál: Ne ja. Ĉi tiu ama dialogo estas nek vera, nek bela. Malbona laboro. Ĉu do tia estas la vivo? Ĉu parolas tiel bonedukita sinjoro kun damo?

Sekretario: Fakte, la komenco estis pli bona.

Gál: Ĉar ĝi estis la vera vivo mem. Bela, vivovigla figuro. La grafo fruktisto. Sed ĉi tiu ama dialogo! Ĝi estas papereca kreaĵo. Ĉu vi ne opinias?

Turai: Mi trovas ĝin vivofidela. (*Rigardas en la broŝuron.*) Nu, ek, al la fino. Nun ili kisis unu la alian.

Almády: Aĥ, Yvonne! Ĉu bongustis mia kiso?

Anjo: Ne, Maurice, via kiso estas naŭza, via barbo pikas.

Almády (*al Turai*): Ĉu tion ni ne elsarkos?

Turai: Kiel vi pensas, ĉion oni ne povas forstreki!

Almády: Sed diri ion tian al mi. La publiko ja malamos min!

Gál: Ĝenerale... pro kiu diablo vi elektis tian rolon? Kial vi ludas tiel senhelpan stultulon?

Turai: Ja prave, mi nur ne volas interveni, sed ankaŭ mi ne kompre-nas, kiel vi ludas tian rolon. Eĉ se ni forlasos ion kaj tion, estas vane, la figuro mem restas malŝatinda kaj ridinda.

Gál: Ĉe tiaj roloj fakulo tuj eksentas, ke la aŭtoro vere naŭziĝas de tia figuro. (*al Turai*) Ĉu vi ne sentas tion?

Turai: Jes, kompreneble. Kial mi ne sentus?

Anjo (*nervoze*): Sinjoroj, ni jam finu! Kredu, Maurice, ankaŭ tiel mi amas vin, kvankam mi scias, ke la tuta mondo priridas vin.

Almády: Mi ankaŭ meritas tion, Yvonne.

Anjo: Ĉu vi ne hontas antaŭ via edzino, Maurice? Antaŭ viaj infanoj?

Almády: Ho! Miaj infanoj!

Anjo: Se via filo ekscius tion! Kiel li opinius prie? Via filo, la husara kolonelo!

Almády (*modeste, al Turai*): Sinjoro, ĉu ne eblus diri ĉi tie leŭtenanton? Ĉu kolonelo – mia filo? Tio terure maljunigas onin.

Anjo: Kvankam mi jam mildigis, ĉar en la teksto staras: generalo.

Almády: Ĉu generalo – mia filo?

Anjo: Ĝis kie mi povas degradi, Aleksandro?

Turai: Maksimume ĝis kapitano.

Anjo: Bone, kiel opinius prie via filo, la husarkapitano?

Almády: Vi pravas, Yvonne. Li malesperiĝus! Mi estas ridinda, maljuna jupĉasisto, fi!

Turai: Mi petas vin... ne tiel dormeme. Kun pli da vervo. Mi petas denove.

Almády: Mi estas ridinda, maljuna jupĉasisto, fi!!

Turai: Ankoraŭ ne sufiĉe sincera. Pli laŭte, pli sincere.

Almády (*kriante*): Mi estas ridinda, maljuna jupĉasisto, fi!!!

Turai (*froste*): Mi petas refoje.

Almády (*kriegante, tre sincere*): Mi estas ridinda, maljuna jupĉasisto, fi!!!!

Turai: Nun bone. Plu!

Almády (*tre sincere*): Mi ĵuras, Yvonne, ke neniam mi altrudos min al tiu damo, kiu ektedis min kaj nun jam amas iun alian. Neniam, neniam plu.

Anjo: Ĉu neniam plu?

Almády (*sincere*): Neniam.

Anjo: Tiam, Maurice, mi fariĝos grandanima. Mi ne veturos al Parizo, kaj vi povas manĝi la persikon.

Almády (*kuras al la persiko*): Aĥ! Fine! (*Mordas en la persikon.*)

Turai (*stariĝas*): Fino. Ĉi tie subiras la kurteno.

Almády (*stariĝas flanken kaj manĝas la persikon.*)

Gál: Ĉu fino?

Turai: Fino.

Gál: Tiun persikon li devus doni propre al sia edzino. Tiel la fino estus pli bela.

Turai: Ej nu, kiel obstina vi estas. Ĉi tiu estas vulgaraĉa, egoista fripono. Li domaĝas la persikon al sia edzino.

Gál: Tre malsimpatia figuro. Sed li perfekte ludas ĝin.

Turai: Kvazaŭ skribita por lia korpo. (*Al la sekretario, kiu senespere moviĝadas.*) Kio vin trafis?

Sekretario: Mi petas pardonon, sed nun mi kuros, por eltrovi ie alian persikon, ĉar mi ne sciis, sinjoroj, ke oni manĝos ĝin en la teatraĵo. (*Elkuras.*)

Anjo (*al Ádám, kiu staras senmova, frapita pro la feliĉo*): Nu, kiel mi plaĉas al vi en ĉi tiu rolo?

Ádám: Pardonu por momento! (*Kun terura forto kisas ŝin.*)

Anjo (*sufokiĝe*): He, vi! Tio estas ja skandalo!

Ádám: Ĉu mi pentu? (*Nova kiso.*) Anjo! Vi ne nur die ludas, sed laŭ mia opinio ĉi tiu estas unu el la plej bonaj pecoj de la mondo. (*Mont-ras al Turai*): Eĉ se mortigos min ĉi tiu maljuna afektulo, mi fordonos la tutan Ŝekspiron por ĉi unu teatraĵeto! (*Brakumas Anjon.*)

Gál: Mi trovas ĉi tiun pecon tre eksmodiĝinta. Kiam devis skribi ĝin Sardou?

Turai: Ĝis nun mi ne konis ĝin. (*al Almády*) Diru, s-ro aktoro, kiu specas teatraĵo de Sardou ĝi estas?

Almády: Se mi ne trompiĝas, lia lasta verko.

Gál: Li devis esti tre maljuna, kiam li verkis ĝin. Tiel magran verketon li devis skribi nur mallonge antaŭ sia morto.

Turai: Aŭ mallonge post sia morto. (*al Anjo*) Mi havus ankoraŭ nur kelkajn reĝisorajn rimarketojn por vi.

Anjo: Jes, jes, mi akceptus ilin kun granda danko. (*al Gál kaj Ádám*) Vi iru, mi baldaŭ venos!

Gál (*dum eliras*): Mi ne komprenas, kiel povas elserĉi por si amheroo tiel kadukulan rolon. Tio estas jam vera masoĥismo. (*For kun*

Ádám.)

Turai (*al la flanke staranta Almády*): Ĉu vi ploras?

Almády (*inter larmoj*): Ne! (*Sovaĝe rigardas al Turai.*)

Turai: Kiel vi pensas, ĉu vi iros?

Almády: Ĝi iros.

Turai: Vi ne komprenas min. Mi pensis ne pri la peco, sed pri vi. Post la prezentado. Vi iros per la nokta trajno. Hejmen. Ĉu vi iros?

Almády: Mi iros.

Turai: Tiam mi lasos forstreki la kapitanon. Vidu, kun kiu vi havas aferon! Anjo, diru leŭtenanton!

Almády: Propre eĉ leŭtenanto estas iom...

Turai (*indigne*): Nu, pardonu min, sinjoro, ĝis infanaĝo ni ja ne povas degradi lin.

Almády (*kapitulacas*): Kiel vi volas. Malgraŭ ĉio, kara s-ro Turai mi dankas por tio, kion vi faris por mi. (*Ekiras.*)

Turai: Ne dankinde. Kien vi iras?

Almády: Ankoraŭ rapide mi enkapigos tiujn francajn nomojn. (*Klinas sin.*) Sinjorino! Sinjoro!

Turai: Ĝis revido, Maurice!

Almády for. Paŭzo.

Anjo (*brakumante Turai*): Mi dankas vin, vi karega, multtorda cerbo! Ĉu estis malfacile?

Turai: Ne. Nur ĉi tiu damnita persiko estis tubero. Glata, rondeta, velura kaj bonodora, kaj ne mordu ĝin! Jen tio estis la plej problema. Ĉu vi kredas, karulino, ke estas tiel facile trovi akcepteblan objekton, kiu estas kaj glata, kaj rondeta, kaj velura, kaj kiun oni ne devas mordi?

Anjo (*honteme*): Li diris tion pri mia ŝultro.

Turai: Ĉu? Kaj mi kredis, pri via frunto.

Anjo: Vi estas obstina fripono.

Turai: Mi sciis, ke fine ĉiu fariĝos ĝentlemano, nur mi estos fripono. Ne, Anjo. Mi savis junulon de multaj-multaj aĉaj suferoj. Kaj mi estas tre kontenta pri mi.

Gál kaj Ádám enpaŝas.

Gál: Venu, la societo estas jam kune!

Lakeo (*enpaŝas*): La tablo estas primetita. (*Staras meze. Ádám prenas Anjon sub la brakon, ili ekiras.*)

Gál (*al Turai*): Ne hontu, oldulo, ke tio okazis alie ol vi pensis. Estas malnova afero, ke troviĝas multaj bonaj dramaturgoj en la mondo, sed la plej bona estas tamen la vivo mem. (*Etendas sian brakon al Turai.*)

Turai (*kroĉas sian brakon kaj ekiras kun li*): Jam ankaŭ pro tio, ke ĝi skribigas siajn verkojn ne per vi. (*Ambaŭ paroj eliras.*)

Lakeo (*antaŭenpaŝas, al la publiko*): Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj... La tablo estas primetita! (*Klinas sin, retropaŝas.*)

Kurteno



Ferenc Molnár (1878-1952): hungara verkisto, dramaturgo, ĵurnalisto, milita korespondanto naskiĝis en germana juda familio. Jam frue kontribuis al pluraj gazetoj, samtempe komencis verki literature. Estis majstro de amuza rakontado, tamen malantaŭ la distra formo kaŝiĝas ĉiufoje serioza socia kritiko, kiun li ofte esprimas per satiraj rimedoj. Liaj verkoj aperis en multaj lingvoj, liaj teatraĵoj estis plurlande surscenigitaj, ankaŭ filmitaj. En *Ludo en la kastelo* li surplumigas am-triangulon, kiu en italia ĉemara kastelo minacas per la ruinigo de pluraj homoj. La

dramaturgo protagonisto aranĝas teatraĵon por la solvo de la konflikto. La humoro kaj profunda homamo de la aŭtoro fajreras tra spritaj dialogoj, kaj donas enigardon en la fundon de homaj animoj.

* * *

Anjo: Kial mi sidiĝu?

Turai: Ĉar mi ne volas, ke vi sidiĝu de tio, kion mi estas dironta. Prefere tiel, pro komplezo. (Tenere trudas ŝin en la fotelon.) Karega Anjo! Malgraŭ tio, ke vi estas la fianĉino de mia juna amiko, vi ankoraŭ havas rilaton kun Almády.

Anjo: Tio estas impertinenta mensogo.

Turai: Temas pri io alia. Mi kredis, vi diros, ke mi havas nenion komunan kun tio.

Anjo: Tion mi ne povas diri, ĉar vi estas la infanisto aŭ kuratoro kaj amiko kaj protektanto kaj, mi ne scias, kio de Adalbeĉjo. Kaj mia aŭtoro kaj amiko. Mi povas nur diri, ke tio estas mensogo kaj kalumnio.

Turai: Tiam estas bone. Ĉar tiel mi scipovas al vi respondi. Mi restadas en ĉi tiu ĉambro jam de hieraŭ vespere. Kaj ĉi tiu muro estas maldika kiel papero.

Anjo: Sankta Ĉielo!

Turai (trankvile): Citrono.

Anjo (kovras sian vizaĝon.)

Turai: Citrono. (Paŭzo.) Nuboskrapulo. Ej nu, karega Anjo. Mi vidas, vi estas saĝa virino. Ni parolu, kiel decas al du viroj. Ĉi tie necesas urĝa riparo.